

HORIZONTO

I-a JARO N-o 5
SEP. - OKT. 1976

KULTURA KAJ INFORMA REVUO



*Kaj tiuj ni, kara mia, per Esperanto faru
unu grandan rondon familian!"*

Aperas kun la afabla permeso de C.E.P.E.

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

KULERO

MALLONGE

DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

HORIZONTO

Direktorino

Inés Gastón

Redakta Komitato

Fernando de Diego

Juan Régulo

Jean Thierry

Red. kaj Adm.

Inés Gastón

P.º Marina Moreno, 35

Telf. (976) 22.05.21

Zaragoza-1 (Hispanujo)

Eldonkvanto 1.000 ekzempleroj

Dumonata revuo

Presita en Zaragoza

ĉe "Tipografía C. Boloix"

str. Reina Fabiola, 7, Zaragoza-8

Leĝa Depono Z-133-76

N.º 5 - Sep. - Okt. - 1976

E N H A V O

LETERO KAJ POEMO DE ZAMENHOF

Prezento (J. Régulo Pérez)

II-a INTERNACIA KONFERENCO de la N.E.M.

Raportas (P. Zacho)

KONKLUDOJ - REZOLUCIO

IOM DA HISTORIO PRI LA NASKIĜO DE "HORIZONTO"

Informas (Inés Gastón)

RAYMOND PEYNET, LA TROBADORO (Jean Thierry)

GRANDA SUKCESO DE LA FAKSIMILO (Peter Zacho)

LA ANTAŬJUGOJ (Jean Thierry)

...KIEL BLINDAJ SAFOJ... (Jean Thierry)

VERKISTOJ KIUJ SKRIBIS PLEJ

MULTE (trad. M. P. Dungeanu)

BELETRO

Kvar poetoj hungaraj (trad. K. Kalocsay)

Epistolo (trad. S. Gumá)

Du versajoj (trad. J. Kohen-Cedek)

Kulero (trad. Anna Dratwer)

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Redaktas (Ivo Lapenna)

LA ALTLERNEJO KROGERUP (H. V. Rasmussen)

EL NIAJ AGAD-GRUPOJ

Germanujo FR. (R. H.)

PRINCIPA DEKLARO DE LA PREZIDANTO DE ILEI

KION VI NE LEGOS ALILOKE

Nefermita letero (H. V. Rasmussen)

SONGO (Isaj Dratwer)

BONA HUMORO kun kaj pri FAMAJ HOMOJ (trad. M. P. Dungeanu)

KIEL ABONI?

Abonojn al "Horizonto" akceptas la Administracio: Inés Gastón, Paseo Marina Moreno, 35, Zaragoza-1, Hispanujo, aŭ la sekvantaj.

PERANTOJ

Aŭstrujo:

Dro. Klaus Perko, Lendkai 111, A-8020 GRAZ. Pĉk. Graz 1257.845. Jarabono: 160,— S.

Britujo:

Geoffrey King, 12 Elmer Close, ENFIELD Middx. EN2 7EZ. Pĉk. 37.507.9106. Jarabono 5 £.

Danlando:

Peter Zacho, Amosevej 5 A, DK-2700 BRØNSHØJ. Bank-konto, 354-800468, Bikuben Jernbanalle 34, Vanløse. Jarabono: 60,— D Kr.

Franco:

André Bourdeaux, 91 rue de la Chapelle, F-75018 PARIS. Pĉk. Paris 21.670.96 V. Jarabono: 40,— Fr.

FR Germanujo:

Irmtraud Haupenthal, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 DUDWEILER. Pĉk. Saarbrücken 15293-667. Jarabono: 24,— DM.

Grekujo:

K. G. Eliopulos, 130 El. Venizelos Ave., NEA SMIRNI —Attiki—. Bank-konto Nro. 040-753362-40, Nacia Banko de Greklando Eolu-str. Jarabono: 300,— Grekaj Drakmoj.

Israelo:

Ben-Alter Jehiel, P. O. B. 379, TETAH TIKVA. Pĉk. Bank Hadoaz, 445854-8. Jarabono: 70 izr. liroj.

Kanado:

Kriss Smilga, 34 Martin Road. TORONTO, Ont. M4S 2V2. Jarabono: 8,— \$.

Luksemburgo:

Albert Wickler, 17 rue St. Laurent, LORENTZWEILER. Konto N.º 5603/6196-3, CEE (Caisse d'Épargne de l'État). Jarabono: 380,— luksemburgaj frankoj.

Nederlando:

Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, HAGO 2011, Poŝtkonto 162626. Jarabono: 25 Gld.

Rumanujo:

Mihail Petre Dungeanu, P.O. Box 502 R-5806 SUCEAVA.

El ĉiuj aliaj landoj oni pagu al unu el tiuj perantoj, ĝis peranto en tiu lando estos trovita. Personoj pretaj funkcii kiel perantoj, bv. sin turni al la direktorino.

OMAGĜE PREZENTITAJ AL PROF. G. WARINGHIEN EN LIA 75^a VIVOJARO

FELIX STONE MOSCHELES (Londono 1833 - Tunbridge Wells 1917) estis portretpentristo, baptofilo de Felix Mendelssohn, tre konata en ĉiuj artistaj kaj pacifistaj rondoj, prezidanto de Londona Esperanto-Klubo, vicprezidanto de Brita Esperanto-Asocio, entuziasma propagandisto kaj pioniro de Esperanto. En 1905 Moscheles faris portreton de Zamenhof kaj en 1907 li invitis gesinjorojn Zamenhof al sia hejmo en Londono post la Universala Kongreso en Kemбриĝo. Ges-roj Zamenhof akceptis kaj kelkajn tagojn ili gastis ĉe ges-roj Moscheles. Dum unu el tiuj tagoj estis aranĝita ĉe Moscheles speciala artvespero honore al la paro Zamenhof.

La amikeco inter la familioj Moscheles kaj Zamenhof etendiĝis longe, kun interŝanĝoj de salutoj, bondeziroj, donacoj. Okaze de la sepdekjara naskiĝdatreveno de S-ro Moscheles, D-ro Zamenhof sendis al li gratulan telegramon, kiun donas Marjorie Boulton en sia libro *Zamenhof*, paĝo 212, kaj kiu tekstas jene:

*Konservu plene amiko plej kara
viglecon kaj sanon ĝis festo centjara*

ZAMENHOFJOJ

Al tiu longa amikeco, aldone al la esperantisteco kaj idealismo de ambaŭ familioj, certe ankaŭ pozitive kontribuis ilia komuna judeco.

Sed probable ne estas ankoraŭ publike konata letero, kiun D-ro Zamenhof sendis al la familio Moscheles, kiam la pentristo estis okdekjara. Mi ne trovis ĝin en *Originala Verkaro* de Zamenhof editorita de D-ro Joh. Dietterle, nek en *Leteroj de L. L. Zamenhof* sub la editoreco de Prof. G. Waringhien. Mi konsultis aliajn presitaĵojn al mi alireblajn kaj nenie mi trovis eĉ aludon al la ekzisto de tiu letero al S-ino Moscheles (kredeble pro la tiam jam alta aĝo de ŝia edzo) kaj de la akompana okaza poemo verkita de Zamenhof en 1913. Per ilia faksimila publikigo mi volas kunomaĝi la 75an jardatrevenon de Prof. Waringhien. Se eble tiu letero kaj la koncerna poemo jam estis ie presitaj en al mi nun ne konsultebla loko, mi petas senkulpigon de Prof. Waringhien, ĉar mia intenco estas pura. Sed eĉ se tiel aperos, mi estas certa, ke multaj esperantistoj tra la mondo ĝojos legi, en iliaj originalaj formoj, tiel simpatiajn sentesprimojn inter du idealismaj familioj, kiuj ĝis la fino de siaj vivoj (Moscheles kaj Zamenhof mortis en 1917) gardis tiel belajn interrilatojn.

Do, eĉ se postfeste, mi tutkore dediĉas la diskonigon de tiuj ĉi zamenhofaĵoj al nia elstara esperantologo kaj zamenhofologo Prof. GASTON WARINGHIEN, Prezidanto de la Akademio de Esperanto, en la espero, ke dum ankoraŭ multaj jaroj li firme deĵoros surpostene kiel same freŝa literatoro vastregistra kaj same neŝancebla fortreso de la Zamenhofa Esperanto.

J. Régulo Pérez

Dr. L. L. Zamenhof
Varsovio, str. Dzika № 9.

10 / I 13

Kara Lingvanoj!
E la dekreveno de la lastaj tagoj
de Lingvo F. Moschales
vole transdoni al mi, mi petas,
la plej koran gratulon de mi
edzino kaj de mi kaj ankaŭ
la malgranda serĝano, tiam
mi en tie almetas plej kore
saldon de mi kaj de mi
familio vole transdoni
ankaŭ al Lingvo F. Moschales.

Vda
Zamenhof

Al mia amata amiko
Felix Moscheles

— por la 8^a de Februaro 1913.

Aŭdian, kiam vi festas,
Mi staras antaŭ ĉe vi:
Se korpe mi forestas,
Spirite mi estas ĉi.

El via serena vizaĝo
Radias luno ĉarma,
Tiel plena de sprito kaj saĝo,
Tamen tiel kvieta kaj varma...

En via voĉo sincera,
La vira, sed gaja kaj mola,
Aŭdigas paco la vera,
Sentigas amo konsola.

Mi premas ben manon
Kun kora simpati'
Kaj longan v. bon kaj sanon
Mi sincere deziras al vi.

Dumetof

RAPORTO PRI LA
DUA INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO
EN PARIZO DE LA UNUA ĜIS LA SEPA DE AŬGUSTO 1976



Dum la Komuna vespermanĝo, la prezidanto de la Konferenco, S-ro J. Thierry (en la mezo) en amika konversacio kun Prof. I. Lapenna (dekstre) kaj S-ro H. Sonnabend, prezidanto de ILEI (maldekstre).

Dimanĉo: Unua renkontiĝo dum komuna vespermanĝo en la restoracio "Paris-Luce". Agrabla amika etoso kaj tre bona arta programo.

Lundo: La laboro komenciĝis per elekto de la prezidantaro: prezidanto Jean Thierry, vicprezidantoj Marianne Vermaas kaj Heinrich Müller. Peter Zacho akceptis la sekretarian laboron.

Bonvenigan paroladon faris Jean Thierry. Li skizis la esperantistan vivon en Parizo ekde 1900 ĝis 02.08.76, elvokante la famajn agojn de Moch, Fruictier, Bourlet, Sébert, Schwartz, Lapenna. Per siaj kulturitaj lingvo kaj voĉo s-ro Thierry desegnis klaran linion pri tradicio formiĝinta de Zamenhof al Lapenna: "Nia neŭtrala movado havas radikojn en 1887, en 1908 kaj 1950. Ni *ne* devios de la zamenhofa esperantismo!".

La enkondukan paroladon faris prof. Lapenna: "La nuna situacio kaj la urĝaj taskoj de NEM". Li parolis pri la nuno: La krizo estas pli profunda ol kelkaj supozas. La politikigo de UEA kaŭzis ĝin. Esencaj estas la homaj rajtoj. UEA ne obeas al artikolo 4. Niaj amikoj en Orienteŭropo subpremiĝas, sed UEA silentas. Laŭ artikolo 13 *nur politike neŭtralaj* organizoj povas aliĝi al UEA, sed la Bulgara Esperanto-Asocio, la ĉeĥa, la orientgermana laborrondo ktp. pledas por proleta internaciismo. Tiu politika slogano perdis sian valoron eĉ por pluraj okcidentaj komunistaj partioj, sed ĝi troviĝas en UEA mem. Estas tre bedaŭrinde, ke la komplotintojn subtenis pluraj tro ambiciaj okcidentuloj, plejparte politikaj naivuloj. Ekzemple Tonkin en la dana *Politiken* provis defendi la neŭtralecon de UEA dirante ke ses estraranoj loĝas en Okcidento kaj nur du en Oriento! Bela "kontraŭpruvo" al tuta libro da dokumentoj pruvantaj la politikan konspiron en UEA. Unu el la klare videblaj sekvoj de la hamburgaj eventoj kaj de la posta ĉesigo de preskaŭ ĉiuj ĝishamburgaj agadoj reflektiĝis en tio, ke en du jaroj UEA perdis kvinonon de la individuaj membroj. Post kelkaj jaroj venos la kompleta kolapso, sed tiam estos tro malfrue por savi kion ajn. Li avertis pri tio en la aprila artikolo antaŭ Hamburgo.

Nun la tasko de NEM estas sekvi la inspirojn de Zamenhof: vera humaneca internaciismo. Li plu fidas al Esperanto kaj al la vastaj tavoloj de tiu esperantistaro, kun kies apogo kaj helpo estis konstruita la moderna ĝishanburga UEA. Kion fari? Kiam UEA estis plej forta, oni rompis la unuecon. Nun estas la tasko de NEM restarigi ĝin. Li mem pledis por unueco, ĉar *unueco estas forto*. Brita Esperantisto de-formis ĝin al *unueco estas morto*. Kion fari? Unue: formu agadgrupojn, agu individue, restu fidelaj al vi mem, esprimu vin ĉie! Due: fortigu la revuon *Horizonto*. Ĝi estu la solida kerno. Kelkaj esperantistoj perdis la kuraĝon pro la hamburgaj fiaĵoj. Legate *Horizonto*-n ili reakiris la fidon. Silento estas detruado de Esperanto. "Ni mobilizu ĉiujn demokratajn fortojn por plu progresigadi kaj la Internacian Lingvon kaj la humanecan internaciismon, sen kiu ĝi ne povas vivi. Sukcesan laboron al vi!"

Tiel parolis Lapenna! Pala bildo estas mia resumeto, sed konstatis la aŭskultantoj, ke la aŭtoro de "Retoriko", de "Esperanto en Perspektivo" kaj de la multaj inspiraj kongresparoladoj estas intelekto kaj emocie eĉ pli forta ol antaŭe. La eventoj eĉ pli akriĝis lian kristale klaran juĝokapablon. Se ĉirkaŭ Lapenna sin arigus eĉ nur kelkaj

dekoj da plej noblaj esperantistoj, tio estus pli ol sufiĉa nombro por konduki Esperanton tra la plej grava krizo en ĝia historio al la fina venko.

Posttagmeze parolis s-ro Sonnabend pri *"Internacia edukado povas esti nur neŭtralia"*. Kiel prezidanto de ILEI li akcentis precipe la sorton de la infanoj en la mondo. Niaj infanoj dekutimiĝas de la nocio homo. Ili lernas malmulton aŭ neniam pri toleremo al aliaj popoloj kaj religioj. La lernolibroj ofte edukas al neneŭtraleco. Sonnabend parolis koncize pri rasismo. Li saĝe prezentis la nunajn taskojn de ILEI. Li ricevis merititan aplaŭdon pro tre pensiga parolado. — Tamen, mi permesas al mi fari etan kritikon. Mi tion faras des pli, ĉar mi mem estas parte kulpa. Dum la ILEI-konferenco en San Marino ni voĉdonis por kunlaboro kun UEA. La komisiono tie ne metis antaŭ nin alternativon. Laŭ mi estis tri eblecoj: aliĝo al UEA, kunlaboro aŭ, la tria, *ne kunlaboro* kun tia kompromitita organizacio. Laŭ mi, ni instruistoj kompromitas nin mem per kiu ajn kunlaboro. Tial, la fina vorto ne estas eldirita.

R. Hauptenthal: "La kontribuo de K. Kalocsay al la Esperanta Kulturo". Perfekta prelego pri la grandegulo de nia literaturo. La preleginto reliefigis interalie liajn tri ĉefajn rolojn de originala verkisto, beletra tradukisto kaj esperantologo. Ĉiu aŭskultinto certe dezirus relegi ĝin.

Mardo: Prof. Lapenna pri *"La fina Akto de la Konferenco de Helsinki el Vidpunkto de la Neŭtrala Esperanto-Movado"*.

La prelego troviĝas sur bendo kaj verŝajne estos havebla. Tial ne estas loko ĉi tie por detala prezento. La temo estas grava kaj aktuala ne nur por la esperantistoj en Eŭropo, sed ankaŭ por la mondo. Prof. Lapenna tre akcentis tiun parton de la Fina Akto, kiu koncernas la Esperanto-movadon: homaj rajtoj, liberecoj, vojaĝado, faciligo de vizoj, turismo (ĉu ankaŭ por orienteuropeanoj?), sporto, kulturo, edukado de la junularo kaj *lingvaj studoj*.

Post la prelego sekvis vigla diskuto, en kiu partoprenis Müller, Thierry, Lapenna, Duplan, Hauptenthal, Roellinger, Vermaas, Lis Thune, P. Zacho kaj Sonnabend. — Dum la debato oni kelkfoje devojiĝis de la fakta temo. Unu afero estas certa: "Helsinki" restos por venontaj debatoj kaj agoj!

Merkredo: Günther Becker, la estinta ĝenerala sekretario de UEA, prelegis pri *Rimedoj de Lingvolernado*. Sperta en sia fako li prezentis al ni la funkciojn de fonemoj, dinemoj, grafemoj kaj olofonoj. La vojo al perfekta rego de nia lingvo: 1) bone aŭskulti 2) legi kaj legi 3) skribi kaj korespondadi kaj 4) la malfacila parolo. Meritita granda aplaŭdo sekvis.

Poste Daniel Luez, gimnazia instruisto pri lingvoj prelegis pri *"Esperanto kaj fremdaj lingvoj"*: "Ne kredu, ke vi posedas lingvon! *La lingvo posedas vin!*" Pardonu, ke mi limigas min nur al tiu pensiga frazo. Altkvalita estis la prelego, inda je nia konferenco. Same meritita granda aplaŭdo!

Ĵaŭdo: Heinz Dieter Maas, specialisto pri komputera esplorado en la universitato de Saarbrücken: "La nuna stato de esploro per komputero, kaj la Esperanta vortrezoro".

Kia seka temo! Kia granda surprizo! Kun la plej granda interesiĝo ĉiuj sekvis la prelegon. Maas nutris sian komputeron per paroladoj de Zamenhof kaj de Lapenna. Inter aliaj gravaj rezultoj li konstatis, ke Zamenhof uzis la imperativan formon trioble tiom, kiom faris Lapenna, aŭ ke Zamenhof uzis multe pli la formon "mi" ol faris Lapenna, dum Lapenna uzis la formon "ni", kie Zamenhof preferis "mi". Se la rezultoj de tiu aspekto de la komputera esploro estus inversaj, tiam iuj gazetoj verŝajne publikigus tutan artikolon por informi, ke la rezulto de la esploro montris la "diktatorecon" kaj "kulton de personeco" de Lapenna kompare kun la modesteco de Zamenhof. Maas ne nur scias aktualigi sekan temon, sed la kultivita kaj simpatia maniero en kiu li prezentis siajn esplorojn entuziasmigis la aŭskultantaron. *La aplaŭdo ne volis fini*. Ni povas rekomendi lin kiel elstaran preleganton en ĉiuj esperantistaj rondoj.

Vendredo: Tuttaga ekskurso al Versailles kaj Fontainebleau. Pri ĝi mi ne povas raporti ĉar mi restis en Parizo por viziti gravan gazeton "Le Monde". Sed, ĉiuj partoprenantoj revenis tre kontentaj.

Sabato: Kiel anoncote, vizitoj tra la urbo. Ĉiuj tre interesaj.

Entute, bonege organizita Konferenco, vere sukcesa same pro la laboro realigita kiel pro la unanimeco en la decidoj.

P. Z.

KONKLUDOJ: DE LA 2-A INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

1. HORIZONTO kaj ĝia rolo — La *gvidlinio* restas la sama kiel ĝis nun: kaj kultura kaj informa; la *redakta komitato* estas tripersona, same kiel en la komenco: Fernando de Diego, Juan Régulo kaj Jean Thierry.
Estos farita anonco por *alvoko al donacoj*; kaj la *garantia fondaĵo* gvidata de P. Zacho estas plue emfazita kaj vastigita.
2. LOKAJ KAJ LANDAJ AGADGRUPOJ — Estas jam konstatebla la ekzisto de jenaj agadgrupoj: la franca (C.E.P.E.), dana, greka kaj germana (S.E.L.); ilin prezentos artikolo en *Horizonto* por instigi al la formiĝo de pliaj.
3. Internacia harmoniigo de agadoj — La ĉeforgano de la Neŭtrala Esperanto-Movado estas la ĉiujara konferenco; la plenumorgano, la agadgrupo komisiita organizi la konferencon.
4. INFORMADO KAJ PUBLIKAJ RILATOJ — André Bourdeaux estas komisiita organizi la publikajn rilatojn de la Neŭtrala Esperanto-Movado; ĉi-cele li pretigos *principaron de publikaj rilatoj* por adopto en la venonta konferenco.
5. KURSOJ KAJ PRAKTIKAJ SERVOJ — Momente ekzistas kursoj de la germana agadgrupo; kaj perkoresponda kurso baldaŭ efektiviĝos en la franca.
6. LIBRO-SERVO — En la nunaj cirkonstancoj la dana agadgrupo estas komisiita organizi libroservon por la 3-a Konferenco. (Sin detenis G. Becker).
7. FAKAJ ORGANIZAJOJ — Punkto prokrastita ĝis la venonta konferenco.
8. TRIA KAJ KVARA I.E.K. — La 3-a Internacia Esperanto-Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado okazos unu semajnon antaŭ la Universala Kongreso, organizita de la dana agadgrupo kun la ĉeftemo: "*En la kadro de la ĝenerala lingva problemo la aparta aspekto de la bezono en Eŭropo.*" (Sin detenis la tri danoj.)
Por la 4-a Konferenco ĉi tiu konferenco kun simpatio konsideras la inviton de la greka agadgrupo kaj atendas pliajn precizigajn informojn ĝis definitiva decido farota en la 3-a.

REZOLUCIO

La 2-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado, okazinta en Parizo de la 1-a ĝis la 7-a de aŭgusto 1976, ANALIZINTE en sia programo ankaŭ la «Finan Akton de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaborado en Eŭropo», kaj KONSIDERINTE ĝiajn konsekvencojn por la Internacia Esperanto-komunaĵo,

- 1.º ESPRIMAS sian solidarecon kun la principoj de sekureco kaj kunlaboro, kiel deklaritaj en la Akto;
- 2.º DONAS SPECIALAN APOGON al la parto koncernanta la kunlaboradon sur la humaneca kaj aliaj kampoj (homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, interalie ankaŭ sporto, informado, studo de fremdaj lingvoj kaj civilizacioj), ĉar tiu parto respondas al la humaneca internaciismo esence ligita al la Internacia Lingvo Esperanto;
- 3.º KONSTATAS, ke bedaŭrinde la ĝisnunaj rezultoj neniel respondas al la promesoj entenataj en la Akto kaj atendataj de la popoloj de Eŭropo, aparte ne en la sfero de libera cirkulado de la homoj kaj ideoj;
- 4.º ATENTIGAS, ke tra la tuta dokumento treniĝas la lingvo-diverseco kiel esenca obstaklo al realigado de ĝiaj promesoj kaj rekomendoj, se tiuj efektive fontis el sinceraj intencoj, ĉar la uzado de la Internacia Lingvo Esperanto kiel komuna neŭtrale homa lingvo estas nepraĵo;
- 5.º KONFIRMAS la ideojn esprimatajn en la «Deklaro de Principoj» adoptita de la 1-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado en Saarbrücken kaj INSTIGAS la Esperanto-parolantojn intensigi siajn agadojn laŭ tiuj principoj;
- 6.º RELIEFIGAS la ekziston de Internacia Esperanto-komunaĵo sendistinge de kiu ajn asocio kaj EMFAZAS la kulturalan identecon de la neŭtrala Esperanto-Movado laŭ la tradicio de 1905, kies esperantismo esprimiĝas en humaneca internaciismo.

Parizo, la 5-an de aŭgusto 1976.

En la nomo de la partoprenantoj de la Konferenco:

J. Thierry, prezidanto; M. H. Vermaas kaj H. Müller, vicprezidantoj; P. Zacho, sekretario.

IOMDA HISTORIO PRI LA NASKIĜO DE "HORIZONTO"

Antaŭ ol legi ĉi tiun informon mi deziras ion klarigi al vi. Kiam mi legos ni, tiu "ni" signifas Gastón. Dum ĉi tiu jaro, pro speciala kaŭzo ni deziras ion fari favore al Esperanto ĉu pere de laboro, ĉu pere de donaco, memore al nia patro. Komprenoble, ni intencis centri nian agadon en «Frateco», la Esperanta Societo de Zaragoza kies fondinto li estis. Sed, kiam ni konsciis ke por la neŭtrala Esperanto-Movado estis necesa internacia interligilo, ni ne hezitis dediĉi al la neŭtrala Esperanto-Movado nian laboron memore al nia patro. Oni diras ke la aragonanoj, la alt' aragonanoj rekte pasas de la privataj aferoj al la universalaj aferoj, plej eble pro tio, li plene sin dediĉis al Esperanto kaj edukis nin laŭ ĝia interna ideo, kiun nia patro nomis humaneca internaciismo. Nia patro mortis en la jaro 1925, antaŭ ol Prof. Lapenna fariĝis esperantisto; do, tiu koincido estas hazardo; sed ne devas mirigi vin ke kiam ni, mia frato Rafael kaj mi, aŭdis por la unua fojo Prof. Lapenna paroli pri humaneca internaciismo, ni nin sentis forte impresitaj, kaj je la fino ni komentis: Laŭ la agadlinio de tiu ĉi homo ni povas daŭrigi nian laboron favore al Esperanto.

Nun, jen mia informo:

Komence de marto 1975, ĉar mi konsciis ke «Boletín», organo de HEF, ne povis plenumi la rolon de internacia interligilo, kaj mi estis preta daŭre aŭdigi la voĉon de la neŭtrala Esperanto-Movado, mi demandis Prof. Lapenna: Ĉu povus interesi, ke ni eldonu apartan revuon? Respondo de Prof. Lapenna: «...ĉiuj saluto kun entuziasmo la publikigadon denova, internacia, politike neŭtrala, Zamenhofa periodaĵo sub via redaktado...».

La 8-an de aprilo 1975 mi skribis al Prof. Dro. Lapenna: Se vi konsideras oportuna la aperigon de nova revuo pli internacia, ni estas pretaj registri novan titolon por eldoni ĝin en Zaragoza kaj ni metos ĝin je via dispono.

Ĉar por tion fari necesas sufiĉe da tempo, mi jam informiĝis pri la afero en la Delegacio pri Informado kaj Turismo. Unuavice ni devas decidi pri la titolo por registri ĝin. Ni pensis pri jenaj: (sekvis vico da titoloj sugestitaj de Fernando de Diego). Nun vi devos elekti aŭ indiki al ni alian. Sub la elektita titolo la revuo povos aperi kiel Kultura kaj Informa. — Komprenoble, por tiu nova revuo oni bezonos la kunlaboron de ĉiuj, kaj abonantojn, sed tiujn ni povos atingi pere de perantoj.

La 24-an de majo mi skribis al Prof. Lapenna: "Pri la revuo: se la unua numero devos aperi en januaro 1976, ni ne povas atendi ĝis la Konferenco en Saarbrücken por registri la titolon kaj peti permeson en la Ministerio pri Informado por eldono de nova revuo. Hodiaŭ mi estis en la ĉi-tiea Delegacio pri Informado kaj oni diris al mi, ke ĉar ni devas kalkuli, ke dum somero ĉiuj ferias kaj ĉio restas prokrastita, ni devas klopodi prezenti la petskribon ne pli malfrue ol la 10-an de junio. — Dum tiu tempo ĝis la kunveno en Saarbrücken mi studos kun la presisto la koston de la eldono, ktp, por ke vi pritraktu la aferon. Pri la elspezoj por la registrado, ne estas necese ke vi kalkulu, ĉar ĝi estos nia kontribuaĵo. — Pri tio bonvolu respondi kiel eble plej baldaŭ".

La 18-an de junio Prof. Lapenna skribis: «Plue, nepre bonvolu entrepreni la paŝojn por la publikigado de la nova periodaĵo. La titolo «Horizonto» ŝajnas al mi tre taŭga. La periodaĵo, kiel mi diris, devus esti vaste kultura kaj iusence organo de la neŭtrala Esperanto-Movado. Hauptenthal renkontos vin post kelkaj tagoj kaj parolos kun vi pri la afero». (Dum nia interparolado S-ro Hauptenthal nur opiniis ke en Hispanujo oni eldonas tre multekoste.) — La 26-an de junio S-ro Bourdeaux skribis leteron en rilato kun la pluirigo de nia entrepreno.

La 1-an de julio mi skribis al Prof. Lapenna: "Sabaton mi ricevis atestilon ke la 25-an de junio, mi prezentis petskribon kaj samtempe mi deponis la bezonatan monon por registri markon sub kiu dum 20 jaroj povos aperi revuo «Horizonto»; tion mi devis prezenti en la Ministerio pri Industrio. — Por la tempo kiam vi alvenos al Saarbrücken, mi sendos al via dumkonferenca adreso kompletan informon pri la revuo, kiun mi metas je via dispono, por ke ĝi estu revuo de la neŭtrala Esperanto-Movado, laŭ via agadlinio. Tiam, vi povos pritrakti la aferon kun la aliaj; mi ankaŭ pritraktos ĝin kun S-ro Hauptenthal. — Komprenoble, la revuo, praktike, estos propraĵo de la neŭtrala Esperanto-Movado, kvankam, almenaŭ momente, mi estos, kiu respondecos antaŭ la oficialaj instancoj. Do, ankaŭ oni devos pensi pri la financa punkto. Mi ne estas tiel optimisma kiel S-ro Bourdeaux kaj mi pensas ke dum la unua jaro ne estos sufiĉe granda nombro da abonantoj por pagi la eldonkostojn".

La 13-an de julio, Prof. Lapenna skribis: «Intertempe vi certe jam renkontiĝis kun s-ro Hauptenthal kaj priparolis kun li ankaŭ la demandon de la nova periodaĵo. Estas tre malfacile havi finan starpunkton pri la karaktero de la nova periodaĵo antaŭ ol ni havas la eblecon pridiskuti la tutan aferon en Saarbrücken. Tute certe la revuo devus esti kultura kaj pritraktadi la temojn, kiujn vi menciis en viaj «teknikaj informoj». Aliflanke, en la

nunaj kondiĉoj necesas havi iun periodaĵon, kiu plu flegos la zamenhofan esperantismon, kiun, kiel vi scias, mi prefere nomas humaneca internaciismo. «Boletín» faris bonegan laboron kaj mi tre esperas, ke ĝi plu agos laŭ la sama linio. Sed «Boletín» estas organo de HEF, relative malmulte legata internacie, kaj, sekve, necesus havi internacian periodaĵon aldone al «Boletín». Kiel dirite, pri ĉio ni devas diskuti en Saarbrücken kaj mi ne povas ne diri al vi ankoraŭfoje, kiom mi treege bedaŭras, ke vi ne povos ĉeesti. — En ĉiu okazo mi petas vin sendi iom detalan planon pri «Horizonto». Ĉar mi forveturos la 20-an de ĉi tiu monato, plej bone estas sendi vian planon al mi je la adreso de SEL. Tre verŝajne mi estos tie jam kelkajn tagojn antaŭ la komenciĝo de la Konferenco».

La 25-an de julio. El mia letero al Prof. Lapenna: «Ĉar mi ne povas partopreni la Unuan Internacian Konferencon de la Neŭtrala Esperanto-Movado, mi skribas al vi kiel promesite.

Pri mia sinteno rilate la Esperanto-Movadon, mi havas nenion novan por diri: vi bone konas ĝin; verdire, ĉiuj partoprenantoj en la Konferenco povas koni ĝin pere de mia agado en «Boletín».

Mi bone scias, ke la neŭtralaj esperantistoj bezonas internacian ligilon. Do, mi informas vin, ke mi havas registritan titolon «Horizonto», kiun mi metas je via dispono. Mi kunsendas la teknikajn informojn de la revuo. Se vi ĝin akceptas, la revuo praktike estos propraĵo de la neŭtrala movado, kvankam, almenaŭ momente, mi estos, kiu respondecos antaŭ la oficialaj instancoj. Do, oni devos ankaŭ pensi pri la financa punkto. Mi preferas averti tion al vi, ĉar nuntempe nia financa situacio ne permesas al ni kovri la deficiton — se ĝi estos —, eĉ ne provizore».

La 17-an de aŭgusto S-ro Hauptenthal informis min pri la Konferenco.

La 23-an de aŭgusto mi respondis.

La 31-an de aŭgusto, S-ro Thierry skribis pri organizado de la revuo. Mi respondis la 18-an de septembro.

La 6-an de septembro Prof. Lapenna informis min pri la diversaj punktoj traktitaj en la Konferenco, ĉefe pri «Horizonto». — Mi respondis la 12-an de septembro.

La 12-an de septembro mi ricevis du letercirkulerojn de S-ro Hauptenthal rilate la eldonon de «nul-numero». La 13-an de septembro Prof. Lapenna skribis al S-ro de Diego kaj mi kaj li prezentis demandojn el letero de S-ro Hauptenthal.

La 24-an de septembro mi respondis: «Mi kunsendas kopion de la respondoj preparitaj interkonsente kun Fernando de Diego».

Intertempe mi ricevis, por aperigi en «Boletín», informon pri la Konferenco kun la Deklaro de Principoj, per kiu mi konstatis, ke «Horizonto» estos la periodaĵo ĉefe uzata de la neŭtrala Esperanto-Movado laŭ la ideoj koncize esprimitaj en la Deklaro (3-a punkto). La flugfolio kaj men-

dilo por «Horizonto» estas verkita en la spirito de la Deklaracio. En ĝi estas dirite, ke «la nova revuo «Horizonto» servu la interesojn de la neŭtrala Esperanto-Movado» kaj ke «krom esti senkompromisa preparolanto de la sendependa neŭtraleco kaj sentinelo de ties principoj, «Horizonto» volas ludi elstaran rolon en la flegado de la kulturo...».

Mi klopodis kontentigi ĉiujn, kaj neniam mi pensis prezenti al via konsidero tiujn klarigojn; sed, nun, post la legado de la letercirkulero de S-ro Hauptenthal de 24-06-76, per kiu li misprezentas la rolon de «Horizonto», mi konsideris oportune informi pri «Horizonto» de antaŭ ĝia naskiĝo ĝis la nuna momento, kaj samtempe mi kaptas la okazon por respondi iujn onidirojn, pri kiuj mi estis vaste informita. Laŭ ili mi estas kvazaŭ marioneto movata de tiuj, kiuj deziris revuon, sed ne deziris morale respondi pri ĝi. Nun vi konas la veron, kaj estu certaj, ke mi havas sufiĉe fortan volon por agi, laŭ mia bontrovo, konkorde kun la ideoj de la Deklaro de Principoj.

Responde al la 3-a punkto de tiu letercirkulero, mi devas diri ke NENIAM kaj NENIE mi anoncis la revuon kiel literaturan revuon, unue ĉar por tiu celo oni ne bezonis aperigi novan periodaĵon: «Literatura Foiro» plenumas tiun rolon; kaj due, ĉar mi konas mian kapablon kaj mi ne estas tiel naŭva nek tiel fiera por rigardi min kapabla ĉefredakti literaturan revuon, sed, super ĉio, ĉar ni opinias, ke la esperantistoj, aŭ almenaŭ granda parto el ili, meritas esti objektive informitaj. Do, kion bezonis la neŭtrala movado por antaŭenigo de Esperanto estis informa-movada revuo. Ĉar ni ankaŭ ne deziris «opozician revuon», tial ni decidis redakti ĝin kiel Kulturajn kaj Informajn revuon, kies celo estas: Informi pri ĉio menciinda, kio okazas en la Esperanta mondo, raportoj ĝian kulturajn agadojn kaj disvolvi laboron de literatura karaktero per originaloj kaj tradukoj en prozo kaj poezio. Temoj: Lingvo, Literatura, Sciencoj, Arto, Generala Kulturo, Turisma Diskonigo, ktp, ĉar Kulturo ne estas nur Literatura kaj Lingvistiko. Kulturo, laŭ la PIV, estas «prizorgado kaj perfektigado de la spirita evoluo de la homo». Sekve, kultura revuo devas disvolvi kulturon, ne nur literaturan. Krome, kultura revuo ne signifas, ke ĝi devas esti nur por la kvazaŭa elito de la esperantistaro. La vera elito disvolvas kulturon ne konsiderante sin super la ceteraj homoj, ĝi devas esti instrua kaj disvolvi kulturon kun respekto pri la plaĉoj kaj opinioj de aliaj. Ekzemple, filatelo estas parto de kulturo kaj certe kontribuas al vastigo de scioj. Inter la esperantistoj troviĝas multaj filatelistoj kaj ekster nia movado troviĝas milionoj da ili. Ilia interesiĝo estas kulturo kaj meritas respekton de kulturaj homoj.

Zaragoza la 31-an de julio 1976.

Inés Gastón

Raymond Peynet, *La Trobadoro*

En 1908 naskiĝis en Parizo Raymond Peynet.

Vizitante la Lernejon pri la artoj aplikitaj al la industrio, li eksentis sin allogita de la humura desegnarto kaj fariĝis aŭtoro de vivantaj desegnaĵoj por la kin- kaj televid-artoj. Li ilustris multajn verkojn kaj kunlaboris en diversaj gazetoj kaj revuoj; li realigis la dekoraciojn kaj kostumojn de pluraj baletoj, komikaj operoj kaj komedioj. Liaj albumoj estas konataj tra la tuta mondo; "*La rondiro ĉirkaŭ la mondo de la geamantoj de Peynet*", jen estas longa vivdesegna filmo lia.

El inter liaj temoj: "*La lernejo de geamantoj*", "*Ambaŭ ni*", "*La rendevuo*", "*Tra noktoj kaj tagoj*", "*La ferioj*", "*La sirenoj*", "*La geedziĝo*", la ĉefaj konsistigas tiom da florornamaĵoj por la krono, kiun lia plumo enteksis honore al la am-poezio.

En mondo plene superŝutita de scienco kaj tekniko Raymond Peynet superstarigas — kiel trobadoro en Floraj Ludoj — super la sekeco de la cerbo kaj cifero la dolĉecon de la koro kaj sento: la koktel-recepto de lia stilo konsistas el unu triono da simplanimeo, unu triono da tenereco kaj unu triono da pasio.

Jean Thierry

* § La poŝtkartoj kun la desegnaĵo, kiun Peynet speciale faris por Esperanto, estas akireblaj po 2 FF (aparta prezo laŭ kvanto).

GRANDA SUKCESO DE LA FAKSIMILO

En numero 1 de *Horizonto* ni informis pri la publikigo en du mil ekzempleroj de faksimilo de Esperantaj poŝtmarkoj destinita ĉefe por la esperantistoj. Temas pri serio de ses poŝtmarkoj, kiuj estis eldonotaj de araba ŝtato. La faksimilo elvokis tian interesigon en filatelaj medioj, ke granda filatela entrepreno ĵus publikigis la duan eldonon de la faksimilo, laŭ filatela vidpunkto ne tute identa kun la unua, en cent mil ekzempleroj. Tiu eldono estas vendata ĉie en la mondo al filatelistoj ekster la Esperanto-movado.

La plano estas publikigi laŭgrade pliajn cent milojn ĝis unu miliono. La filatelistoj bone komprenas la valoron de tiaj faksimiloj, sed por la neinformitaj personoj mi donas interesan ekzemplon. En 1965 estis konkurso pri desegno por eldonota dana poŝtmarko. Unu el la konkursantoj desegnis nian faman preĝejon de Grundtvig. Li ricevis premion, sed la poŝtmarko ne estis eldonita. Tamen ĝi, kiel projekto, estis presita en kelkmiloj da ekzempleroj. Antaŭ nelonge aperis en danaj gazetoj anonco pri vendooferto de la publikigita projekto. Jen la traduko de la anonco: "*La preĝejo de Grundtvig, Prov-poŝtmarko. Tutfolio, tipo A (nur kelkajn ekzemplerojn oni konas) vendiĝas je plej alta oferto pli ol 5000 kr. (= 800 usonaj dolaroj) antaŭ la 18a de aprilo*".

La eldono de la Esperanta faksimilo estas granda reklamo por Esperanto. Ĝi diskonigas en filatelaj medioj la nomojn de d-ro Zamenhof kaj de la plej elstaraj aktivoj en la Esperanto-movado, kaj kelkajn ĉefverkojn de la Esperanta literaturo.

Peter Zacho

LA ANTAŬJUĜOJ!

En ĉi tiu serio da artikoloj estos prilumitaj la plej gravaj el tiuj, kiuj bremsas la normalan disvastiĝadon de la lingvo.

I PRI LA LINGVO KIEL ESPRIMILO

Esperanto eble taŭgas — oni koncedos — kiel kodo por la komerco; sed ĝi ne estas kultura lingvo kaj tial ne kapablas esprimi la nuancojn de la penso nek la sentojn de la poezio: Esperanto havas nek beletrajn tradiciojn, nek literaturon, nek poetojn.

Kaj hej! Kuraĝon! Ek al la besto! Eĉ laŭ s-ro Remy de Gourmont: *“La komerco kaj industrio, vivante el preciza lingvo, estas fermitaj al Esperanto, kiu formas siajn vortojn, kiel kreolaj nigruloj (“SIC!”), per du balbutoj almetitaj laŭ infaneca logiko!”* He! Per floroj ne plu superĵetu ĝin!

Nu, se ne mankas al Esperanto ĝuste la poetoj, ja mankas al tiaj deklarantoj la prudento! La literaturo de la esperantistaro montriĝas efektive sub duobla aspekto.

TRADUKA LITERATURO, ĝi konsistas el grandega kaj riĉa mozaiko de la homaj valoroj esprimataj en la diversaj lingvoj de la mondo cetere tiel en la regionaj kiel en la naciaj. Kiel en sia verketo de la kolekto “Kion mi scias?” (n.º 1511, PUF 1973), skribis la profesoro pri anglaj lingvo kaj literaturo de Clermont Ferrand, Pierre Janton: *“La esperantisto havas do je sia dispono e’ektaĵon tute reprezentindan je la beletra produkto de la homaro, kaj ĉi tiu fakto konsistigas, pli bone ol ĉiuj provoj de du- aŭ tri-lingvismo, la solan progreson vere ne retroireblan plenumitan ĝis hodiaŭ en la direkto al universala kulturo.”*

ORIGINALA LITERATURO, ĝi respondas al la aspiro de la latina poeto Terencio: *“HOMO SUM: HUMANI NIHIL A ME ALIENUM PUTO”*, kaj antaŭsignas tion, kion s-ro René Maheu, iama ĝenerala direktoro de Unesko, nomis *“LA CIVILIZACIO DE LA UNIVERSALA”*. *“Post elprovado de tri jarcentaj kvaronoj etendita al preskaŭ ĉiuj landoj, deklaras ankoraŭ prof. Pierre Janton en la sama verko, la pruvo estas farita, ke lingvo artefarita povas esprimi ĉiujn animajn riĉaĵojn, kiam, kiel Esperanto, ĝi sciopovis estigi kaj disvolvi sian propran animon.”* Ĉi tiu estiĝis el la inspiro de tio, kion oni tradicie nomas en Esperanto *“LA INTERNA IDEO”*, nome tiu ideo de solidareco komuna al la tuta homaro, jen nura malvero, al la homaro *“enŝipigita”* kiel dirus Pascal sur la planedo tero: idealo de humanismo internacie disvolvita.

Tial ĵeti anatemon sur Esperanton, ĝin kondami apriorie per tia senbaza aserto, ke artefarita lingvo ne povas esti *“la vehiklo de ia ajn vera penso nek de ia ajn vera kulturo...”* (Vidu ĉi-rilate la 1-an artikolon), dum ĝia kultura subteno etendiĝas ĝuste al la tuta homaro, jen nura malvero, kiu provokas, ĉu ne vere? la indignon de ĉiu klera kaj bone informita spirito!

Kaj plue ekkrias prof. Pierre Janton: *“Restas substrekinde, ke en malpli ol unu jarcento la esperantistaj verkistoj ludis rolon decidigan por la estonteco de la lingvo. Ili riĉigis kaj perfektigis la vortrezoron kaj fundamentan gramatikon; ili esploris la eblojn kaj ekspluatigis la potencialon; ili ellaboris lingvon kapablan plenumi ĉiujn siajn lingvo-funkciojn kaj vivantan el sia propra vivo.”* Alidire, ĉia kultura lingvo estas verko de poetoj kaj ne de lingvistoj! Kaj neniam oni sufiĉe substrekos la gravegan rolon de la literaturo por la riĉigo, perfektigo kaj unuvorte disvolviĝo de la lingvo.

Cetere, pri la *“du balbutoj”* de s-ro Remy de Gourmont, kiel tipo de la misfamigantoj, ni lasu respondi s-ron Maurice Genevoix de la *“Franca Akademio”*: *“Esperanto tute ne estas lingvo unuforma, ia lingvo robota, sed male lingvo natura kaj malrigida... Esperanto kapablas esprimi nuancojn la plej subtilajn de la penso kaj sento, ĝi taŭgas konsekvence por ebligi esprimon la plej ĝustan, la plej beletran, la plej estetikan, kaj por kontentigi spiritojn la plej tikliĝemajn kaj la plej partikularajn... kaj ĝi ne povas ĉagreni la fidelulojn de la naciaj lingvoj.”*

(daŭrigota) J. T.

... KIEL BLINDAJ ŜAFOJ ...

Foliumante la paĝojn de la **PLENA ILUSTRITA VORTARO**, vi malkovros la trezoron de la vortoj kaj ne nur tiun de la signifaj valoroj sed ankaŭ tiun de la historia senco-sedimento. Precipe sub la plumo de d-ro L. L. Zamenhof amaso da citaĵoj prilumas kelke da karakterizaĵoj de la movado, ekzemple el la vortar-artikolo pri ŝafo: "*...La pli granda parto de la E-istoj estas kiel blindaj ŝafoj.*" Kiom da sperto devis suferi la modesta geniulo por esprimi tian konstaton! Jen kio klarigas multajn aferojn kaj interalie kial kelkaj intriguloj kvazaŭ pro eterna magia ciklo ĉiam sukcesas ruiĝi la plej belan programon aŭ progreson de siaj antaŭuloj.

Ja ne nur en Esperantio oni konstatas la ekziston de granda plimulto, kies respondeca silentemo ebligas, se ne favoras, la bedaŭrindaĵojn de diversajn minoritatoj kaj individuoj karakterizataj de perforta altrudiĝemo: pro manko de tradicio aŭ argumento tiaj homoj efektive substituas al la forto de la praveco la forton de la demagogio. Sed en idealisma movado kiel la nia la damaĝoj estas multe pli danĝeraj ol en iu ajn alia societo. Ne nur la "idealistaj" homoj ja tra konfliktoj kaj disputoj riskas tre rapide senkuraĝiĝi, sed ankaŭ ne malpli rapide ekregas la regulo, kiel scipovi ne manifesti sian opinion por malplaĉi al neniu! Tiel la pravo kaj malpravo restas konfuzitaj, kaj la slogano "*Estu paco je iu ajn kosto*" fine — kiel mar-ondo sur la sablo forviŝas iun ajn spuron — refajlas sendistinge ĉion sur la rango de balaaĵo! Pri tio en la historio respondecos la silentema plimulto, se ĝi ne vekigis el sia kutima torporo; precipe por la vivo de la lingvo "*Jam temp' estas!*"

Neniu do miru plu pri la malrapideco, stagnado aŭ regreso de la afero! Spite al ĉiaj avertoj kontraŭ la politikigo de UEA kaj pli freŝdate kontraŭ la politikeco de Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo de Germana Demokratia Respubliko (CLEK), nenio malhelpis la sukceson de la Hamburga konspiro same kiel la aliĝon de CLEK, kiu estis ĵus akceptita de la nuna Komitato de UEA en Ateno.

Ja, kiel bedaŭrinde prave skribis d-ro L. L. Zamenhof, "*la pli granda parto de la E-istoj estas kiel blindaj ŝafoj*".

Jean Thierry

VERKISTOJ KIUJ SKRIBIS PLEJ MULTE

La kreinto de la nacia hispana teatro Lope de Vega (1562-1632) skribis ĉirkaŭ 2200 teatraĵojn kun granda diverseco de temoj.

La verkaro de la anglo Frank Richards (1875-1961) nombras entute 72 milionojn da vortoj.

Konata belga aŭtoro de policaĵ romanoj Georges Simenon (n. 1903) skribis 210 romanojn subskribitajn per sia nomo (el tiuj 77 havas kiel ĉefan heroon la popularan komisararon Maigret), ankaŭ aliajn 200 subskribitajn per 17 pseŭdonimoj.

En la epistola ĝenro superis Voltaire, franca verkisto kaj pensisto (1694-1778), kiu elsendis pli ol 210.000 leterojn.

Franca poeto Victor Hugo (1802-1885) skribis pli ol 100.000 versojn.

La aŭtoro de unu el la plej longaj romanoj estas Marcel Proust (1871-1922), kiu skribis: "*En la serĉo de la perditita tempo*" (15 volumoj kun 4.310.000 vortoj).

La tuta verkaro de Alexandre Dumas patro konsistas el 257 volumoj — pli abunda ol la verkaro de Balzac, kiu skribis nur 150 librojn.

El la rumana lingvo esperantigis
M. P. Dungeanu

KVAR POETOJ HUNGARAJ

SONETO

Cu vi ne amas al piano veni
 en forlasita ĉambro posttagmeze
 kaj stulte enpensigi, mallert-peze
 per unu fingro klavojn trapromeni?
 Domage, muziknotojn mi ne konas,
 nur palpas mi sur nigro kaj sur blanko,
 tiam mi tamen estas muzikanto,
 muzikojn nefineblajn mi komponas.
 Feinoj el la kordoj nun respondas,
 memor' de mond' revata min traondas,
 plezur' krepuska, trist' lontana ploras,
 vortruboj de volupto senkonscia,
 sonĝata ŝrik' de l' nokto agonias,
 ĉio. La mondo. Diri mi ne povas.

Ernö Szép (1884-1953)

KIA ESTIS...

Kia estis ŝia blond', mi jam ne scias,
 sed scias, ke l' kamparo estis blonda
 se l' spikoriĉa or-somer' radias...
 Mi ŝin resentas en ĉi oro orda.
 Kaj ŝia okulblu'? Mi jam ne scias.
 Sed se la bril' septembra de l' ĉielo
 post nubokrev' adiaŭtriste strias
 revigas al mi ŝia okulhelo.
 Kaj ŝia voĉosilk'? Mi jam ne scias,
 sed en suspir' de l' kampo printempflora
 la varma vok' de Anna melodias
 el florsezon' pli-ol-ĉiele fora.

Gyula Juhász (1883-1937)

CIVILIZO

Iam oni en milito
 al principoj sin ne tenis,
 de l' feblulo la pli forta
 kion preni povis, prenis.
 Nun alie jam! La mondon
 konferenco reglamentas.
 Se l' fortul' misaĵon faras,
 ĝi kunsidas — kaj konsentas.

János Arany (1817-1882)

FLAMO

Mi ĵetis alumeton. Tere
 ekflagris ĝi tuj spitifere.
 La eta flam' kun ĉapo pinta,
 sur piedfingrojn stariĝinta,
 sin streĉis gaje, nano stranga,
 kun swing' alsupra kaj alflanka,
 la verdon mordis, volis febre
 belegan incendion, nepre,
 miraklon ruĝan, arbar-brulon,
 aeron ardan, ĉielpurpuron.
 Sed, en orgojlo, nur kvietis
 la arboj, ĉiu flor' ridetis,
 neniu pro l' danĝer' angoris,
 eĉ seka herbo ĝin ignoris.
 La febra nana flam' fridiĝis,
 jam laca, sur la ter' sidiĝis,
 ekflagris laste, kun kapklin'
 sur musktapiŝo mortis. —Fin'.
 Krom mi, neniu vidis ĝin.

Árpád Tóth (1886-1928)

En majstras tradukoj de Kálmán Kalocsay.

Joaquim Maria Bartrina, poeto kaj filozofo, naskiĝis en la urbo Reus la 26-an de aprilo, j. 1880-a, kaj mortis en Barcelona la 4-an de aŭgusto, j. 1880-a. Li do vivis nur 30 jarojn. Estas tre rimarkinda la aktualeco de tiu Epistolo, premiita en kataluna konkurso de Floraj Ludoj en la jaro 1876-a, ĝuste do antaŭ cent jaroj.

Estas por mi honoro kaj devo diskonigi tra la mondo, en la centa datreveno de tiu verko, la nomon de nia Bartrina.

La tradukinto

EPISTOLO

Ho amik', se amik' ankoraŭ, aŭskultu;
se nur ŝajna, se l'amikec' malnova
disronĝite de l'egoisma vermo
rompiĝas same kiel putra trunko,
ne legu... Sed se iel egoisma
vidante versojn jetos la leteron!

Mi dubas. Dubadas. Kaj al mi mankas
volo kaj forto por kredi sincere.
Nur falseco ĉirkaŭas min; neniam
la esencon de l' mondo mi komprenos.
La kosman mirindon mi povas legi
analizante la lumon de l' steloj
trembrilantaj, tie, for, en ĉielo...
sed analizi lumon de rigardo
aŭ legi en koro, jen la neeblo!

Kiel ne dubi la mondon, trovante
hipokritulojn kaj falsecon ĉie?
Per falsa glori oni faras renomojn
samkiel kronojn per karton' kolora;
kaj al miopul' ĉio ŝajnas ora.
Timidege sin kaŝas la merito
kaj maltime sin levas la nescio;
tial sur la mar' flosas bagateloj
kaj nur sur la fundo kuŝas la perloj.

Leviĝi! Pli supren! Oni ja scias
ke la altecon atingas krom agloj
ankaŭ ia perfida reptilio,
ĉar la rampado estas ja facila.
Kaj, kiam jam surpinte ĝi deziras
rampi pli alten, ĝi tion prosperas
per misfamigo de sia medio.
Tion, neakuzate, faras multaj
kiuj kvankam timemaj, kaŭzas timon!
Aliaj —ŝtupar' de ambiciuloj—
sian honestecon laŭdegas ĉie
kaj pro feblec' aŭ indiferenteco
fariĝas krimkomplotoj, ĉar ne ligas
la kaŭzojn kaj efikojn, kaj ne vidas
ke fremda damaĝo koncernas ilin.
Kampur' flegme vidas montsenarbigon;
li ne priponas, sed eĉ profitas;
kiam pli poste, pluvos torente,
l'akvo, nebarate, de sur la monto
fluas malsupren, riverojn ŝveligas,
inundas kampojn kaj lin mem dronigas!

Unu, pro flegmeco kaj apatio,
la alia, pro malico, toleras
ke la mensogo regas tutan mondon.
Kaj la junuloj? Se la egoismon
havas nur maljunuloj, kial ili
ne ŝanĝas ĉion por bon' de l' popoloj?
Kion faras almenaŭ la plej kleraj,
kiuj ĉar diplomitaj aŭ bonstataj
devas esti ekzemplo al aliaj?

Vestita per livreo, laŭ la modo
ĉiam ridinda pro kapricoj siaj,
jen unu: Pri lia kapo pli zorgas
la perukistoj ol la profesoroj;
li sin taksas artamanto, ĉar ŝatas
la dancistinojn kaj toreadorojn,
kaj pro sia klaĉad' kontraŭvirina
li estas monstro, ne filo de patrino.
Pro vizitoj, teatroj kaj promenoj
ne havas tempon pensi, nur laboras...
Jen do la HOMO SAPIENS de Linneo!
Se kiel tiu estus la aliaj
la saĝo mankus ĝis la Lasta Juĝo! (1)

Se fakte, do, tiaj estas la homoj,
ho vero, virto! Kie vi troviĝas?
Ĉu en la popol'? Sed kio ĝi estas?
Ĉu la amaso, kiu gaje krias
en sia Lernejo, la Taŭrareneno?
Ĉu la amaso svarmanta sur stratoj
ĝojkrianta: Vivu la Libereco!
tamen sklava unue de l' Nescio,
due de l' Pasioj kaj de l' Idoloj
kiujn ĝi nun levas kaj morgaŭ tretas?
Ĉar estas malvirto, ekzistas virto;
sed mi ne scias trovi ĝin, verŝajne
ĉar ĝi elfuĝis el la grandaj urboj
tro malgrandaj por la virto vivanta
kutime en la kor' de la justuloj!
Eble tial. Kiel la virto povas
observi ne naŭzate la ridindan
spektaklon, kiun plej ofte prezentas
la urbegoj al homoj konsciencaj?
Tie vidiĝas la Olimpiaj Dioj,
kiuj, ekzilate, kun ni loĝadas;
MOMO pelis TALIAN el teatroj;
la MUZOJ vendas strasojn sur la stratoj;
VENERA ne plu pozas por artistoj
ĉar estas nun pli belaj la FURIOJ;
VULKANO nun la PARCOJN kontentigas
forĝante tage-nokte batalilojn
kaj MERKURO, en sia Borso-Templo
ĝapeme observas kiel KUPIDO
jam malvindite, kalkuladas ĉiam.

Kaj KUPIDO pravas ĉar nun la homoj
interesiĝas nur pri la havaĵo;
kaj ĉiu orhavanto, krom je oro
sincere nur sin mem kredas kaj ŝatas,
kio estas ja kredo tre malgrasa!

Ĉu do ne ekzistas savo? Ĉu eble
la Progres' estas rondo kondukanta
nin al nia devena sovaĝeco
post travivado de jarcentoj gloraj
samkiel riveras al mar' la gutoj
ĉielen venintaj el mar' per nuboj?

La Homo, kiu por popolkunigo
sklavigis fulmojn, ĉu iam ne povos
redukti la distancon nun senfinan
inter kap' kaj koro? Ĉu li ne tiros
same kiel diamanton el karbo
amon el egoism' por sia krono?
Kiel bone tiel! Tiam la homoj
estus ja homoj, kaj estus anĝeloj
la hominoj. Sed ne nun. Idealojn
kaj virtojn tuj forviŝas l' egoismo
ampleksiĝanta kiel incendio:
Kion fajro lasas, fumo nigrigas.

Feliĉa vi! Feliĉa vi, vivanta
 en kampa domo for de l' monda bruo
 kaj en vintraĵoj — por mi malĝojaj —
 apud la kamen', kie ardaĵoj ŝtipoj
 radias ĉirkaŭen varmon kaj lumon,
 dum via edzino lulas la bebnon
 kun dolĉetaj kantoj, vi la aliajn
 instruas ami Dion kaj gepatrojn;
 kaj la vento, siblanta tra la fendoj
 buklante la blondajn harojn de l' filoj
 enblovas la sopiratan aromon
 de la rezinaj pinoj de la monto.

El la kataluna lingvo tradukis
Salvador Gumà

- (1) En la originalo, *Judici* havas duoblan signifon: Saĝo kaj Juĝo. Per tio la aŭtoro esprimas, ke ne ekzistus saĝo ĝis la mondfiniĝo, t.e. neniam.
 (2) Mitologiaj nomoj: MOMO, dio de rido kaj moko; TALIA, muzo de la komedio; VENERA, diino de amo; MUZO, diino de arto kaj scienco; FURIO, infera diino de venĝo; VULKANO, dio de fajro; PARCO, diino kiu ŝpinas, bobenas kaj tranĉas la homan vivon; MERKURO, dio de elokventeco kaj komerco; KUPIDO, dio de la amo.

DU VERSAĴOJ

el la hebrea mezepoka poezio
 de
 rabbi Semuel (ben Josef ha-Levi) ha-Nagid
 (arabe: Ibn-Naĝdila)
 Kordovo 993 - Granado 1056

Filozofo, ekzegezisto, lingvisto kaj poeto

Servis ĉefveziro kaj armeestro en la kortego de Badis, — la islama reĝo de la Malaga ŝtato. Aŭtoro de bibli-ekzegezaj kaj pritalmudaj verkoj, de biblia leksikono, de batal-priskribaj poemoj kaj diversspecaĵaj versaĵoj.

Ne evitadis am-temajn versojn kaj la rimadon laŭ gramatikaj sufiksoj («adasis-moj»), per unusola rimfinaĵo en la tuta versaĵo.

La sekvantaj tradukoj prezentas modelojn de ĝuste tiaj vers-kategorioj.

El la hebrea
 J. Kohen-Cedek
 Jerusalemo

I

AMPETOLOJ

Ŝiaj lipoj — dolĉa nard',
 Brakoj — ama nesto,
 Fajro brulas en rigard',
 Flam' — sub ŝia vesto.
 Min incitas l' amsufer', —
 Ridas ŝi kaj mokas;
 Mi foriras sen esper', —
 Ŝi min loge vokas.
 Diras: — «Nur malbona vir'
 Revas pri petolo,
 Dum virina nedezir',
 Malgraŭ ŝia volo!»
 — Mia linda vivornam',
 Mem vi konsideru:
 Kulpas via bel' pri l' am',
 Do, ne plu koleru!

II

LEVU POKALON KAJ TRINKU!

Nobel' kaj amiko, noblulo,
 Kun ĉiu alia bonulo,
 Kunvenu en nia angulo,
 Ĉar kovras ĉielon nebulo.
 Enkora dolor', aŭ skrupulo,
 Por ni servu kiel stimulo
 Trinkadi la vinon, — postulo
 En kvanto de akvo por mulo...
 Por dronu l' anima korbrulo
 Kaj ĝoju la lang' kaj l' okulo,
 Validu por ni la gratulo:
 «Je vivo sen zorg', sen kalkulo!»...

KULERO

— Rigardu — diris purigistino, tenante maljunulon je brako kaj montrante kuleron al milicano. — Ĉu vi vidas? Mi rimarkis, kiel li metis ĝin en poŝon, haltigis lin kaj vokis vin. Li intencis ĝin ŝteli.

— Ne vero — neis la maljunulo — mi ne volis ĝin ŝteli. Ĝi estas mia kulero. Mia propra.

— Silentu! — la purigistino estis jam kolera. — En la manĝejon ci alvenas kun propra kulero, ĉu?

— Jes — la maljunulo rigardis la milicanon trankvile, kun fido.

— Ĝi estas mia kulero.

— Ĉu li jam foje estis ĉi tie? — demandis la milicano, prenante la kuleron el la mano de la purigistino kaj atente rigardante ĝin.

— Ĉu li estis? Li ja alvenas ĉi tien ĉiutage! Eĉ mi ne memoras kiom longe. Sola li estas, ne havas hejmon, nek iun ajn. Li venas ĉi tien tagmanĝi. Ni donas al li manĝon sen pago. Sen pago — ŝi ripetis akcentante — kaj kolere ektiris la maljunulon je la brako. — Kaj krome li ŝtelas!...

— Ne vero. Neniam ion mi ŝtelis. La kulero estas mia.

— Ĉu nenio plu mankas ĉi tie? — demandis la milicano, atente observante la maljunulon.

— Ĉu mankas? Mi ne scias. Tiajn objektojn kiel kulerojn neniam ni kalkulas.

— Hm...

— Neniam mi supozis, ke iu ŝtelus kulerojn.

— Diverse okazas. — La milicano ion konsideris. — Ĉu sur tiu ĉi kulero estas ia signo? — li demandis fine.

— Signo? — ekmiris la purigistino.

— Kia signo?

— Ke la kulero estas ĝuste el tiu ĉi manĝejo.

— Ne... Ne estas. Ni ne faras tiajn signojn.

— Malbone. Tiukaze nenion mi povos pruvi.

— Do, kiel estos — demandis la purigistino.

— Vi devas signi kulerojn. Se mi kaptus lin kun la signita kulero la afero estus klara.

— Ĉu signi ĉiujn kulerojn? — Tuj — ŝi ekkuris en kuirejon kaj revenis kun tranĉilo. Ŝi prenis la kuleron de la milicano.

— Anstataŭ signi ĉiujn, sufiĉos se mi signos la lian.

— Povas esti — konsentis la milicano — plej grave, ke ĝi havu signon.

— Ne! — diris la maljunulo. Li diris mallaŭte, sed eksonis tiel, kiel ia surdiga duonkrio. — Ne! Ne signu la mian. Ĝi ja estas mia kulero. Mia propra.

Sed la purigistino jam ion skrapis per tranĉilo sur la tenilo.

— Prenu — fine ŝi donis la kuleron al la maljunulo, kaj la maljunulo prenis ĝin aŭtomate.

— En ordo — diris la milicano. — Kaj mi petas ĉiutage kontroli. Se li volos elporti alian, tiam... — li signifoplene ekrigardis la maljunulon.

— Mi ne volos elporti — respondis la maljunulo, levante por momento kapon kaj tuj ree mallevante ĝin. — Neniam ion mi elportis. Ekde tempo kiam mi komencis venadi ĉi tien, ĉiam mi havis tiun ĉi kuleron. Mian propran...

Morgaŭe, kiam la maljunulo finis jam manĝi kaj zorge viŝinte la kuleron, volis meti ĝin en poŝon, aliris al li la purigistino.

— Montru! — ŝi postulis. Kaj la maljunulo nevolonte montris ĝin.

— Kio ĝi estas? — ŝi ekmiris.

— Nenio — respondis la maljunulo.

— Mi rompis nur pecon de la tenilo, kie estis tiu signo. Ankaŭ tiel oni ja povos ĝin rekonii.

El la pola tradukis
mag. Anna Dratwer

ESPLORO KAJ DOKUMENTADO (ED)

Redaktas Prof. D-ro Ivo Lapenna
N-ro 5

5.1 Esperanto-Dokumentoj de UEA

5.1.1 *Enkonduka rimarko.* — Kiel konate, la ĝishamburga Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) ĉesis ekzisti. Unu el ĝiaj multnombraj agadoj en la periodo de 1952 ĝis la fino de 1974 estis eldonado de dokumentoj pri la lingva problemoj en mondaj kadroj kaj pri la Internacia Lingvo. Entute CED publikigis 325 dokumentojn aldone al pluraj libroj, apartaj studoj kaj aliaj materialoj (v. ĉap. 20.2 de *Esperanto en Perspektivo*). En n-ro 1/76 de *Esperanto*, p. 3, estis publikigita informo, ke en 1976 aperos nova serio de dokumentoj sub la titolo *Esperanto-Dokumentoj*; ke tiujn dokumentojn eldonados UEA mem (ne CED); kaj ke "ili anstataŭas la dokumentojn, kiujn de 1951 ĝis 1974 eldonis CED". Estis ankaŭ dirite, ke "ĉiu el la novaj dokumentoj enhavas referencon pri la ĉapitro de *Esperanto en Perspektivo* (en la plua teksto *EeP*), al kiu ĝi plej proksime rilatas, tiel ke la nova serio formas kvazaŭ konstante kreskantan suplementon de tiu grava manlibro".

Pro la fakto, ke mi mem kaj la du kunaŭtoroj de *EeP* eksplicite rezervis la aŭtorajn rajtojn pri niaj respektivaj partoj, mi malpermesis la publikigon de *Esperanto-Dokumentoj*, sed mi deklaris kaj al la nuna gvidantaro de UEA kaj publike en *Horizonto*

(v. 2.5 kaj 3.2 de tiu ĉi rubriko), ke mi estas preta konsideri permeson, se oni informos min pri kio fakte temas. La nuna gvidantaro ne informis min pri tio, nek havigis de mi la necesan permeson, sed kontraŭleĝe komencis eldonadi la novan serion. Ĝi eĉ ne sendis al mi unusolan ekzempleron, tiel ke almenaŭ laŭ tiu vojo mi kiel ĉefredaktoro kaj verkinto de ĉ. duono de *EeP* informiĝu pri la enhavo de la dokumentoj en la "nova serio", precipe pri tiuj rilatantaj al la partoj de *EeP*, verkitaj de mi mem. Eĉ senkonsidere al ĉio cetera, tiu intenco malobservo de elementa devo, respektata ĉie en la civilizita mondo, plian fojon reflektas la nivelon de intelekta honesteco de la respondeculoj. Lasante flanke en tiu ĉi kunteksto la juran aspekton de tiu ĉi nova afero en UEA, ĉi tie ni limigu nin nur al la enhavo de la dokumentoj E 1-3, kiuj ĵus venis en mian posedon.

5.1.2 *La "dokumentoj".* — Sub la titolo *Unesko kaj UEA*, la unua "dokumento" en la "nova serio" celas prezenti la "kontribuon de UEA al la laboro de Unesko inter 1954-1974". La aŭtoro ne estas indikita. La teksto estas ĉerpita el ĉap. 22.3 ("Unuigintaj Nacioj kaj Unesko") de *EeP*, do unu el la ĉapitroj, pri kiuj la redaktoro de tiu ĉi rubriko rezervis la aŭtorajn rajtojn. La kompilinto ne kapablis eĉ atente legi kaj inteligente resumi tiun parton de la verko. Jam sur p. 2 de la "dokumento" li faris gravegan eraron. Transskribinte laŭvorte la konatan Rezolucion de 10.12.1954, li asertas: "El tiu ĉi Rezolucio kreskis la konsultaj rilatoj inter Unesko kaj Universala Esperanto-Asocio". *Interlingvistika Informa Servo* de D-ro A. Bormann rapidis senkritike ripeti la malĝustajon: "El tio (la Rezolucio de 10.12.1954) rezultis konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko..." (n-ro 2/76, p. 25). Fakte, ekde 1954 multfoje estis dirite kaj en *EeP* ripetite, ke la konsultaj rilatoj kaj la Peticio estis du sendependaj demandoj (p. 767). UEA ricevis la konsultajn rilatojn jam la 25-an de novembro 1954, dum la Rezolucio estis fine akceptita nur la 10-an de decembro 1954, kiel pli ol klare prezentite en *EeP* (p-oj 768 kaj 772-73). La kompilinto skribas, ke "la Rezolucio kondukis al aktiva kunlaboro inter UEA kaj Unesko en multaj sferoj" kaj tuj mencias la "gravajn kampanjojn de Unesko", en kiuj UEA partoprenis. Efektive, la partopreno de UEA en tiuj kampanjoj okazis en la kadro de la konsultaj rilatoj, ne rezulte de la Rezolucio, kiu havis kaj plu konservas tute aliajn signifon kaj valoron (v. 2.3.5.1 kaj 2.3.5.2 de *EeP*). Sur la sama p. 2 la "dokumento" mencias la fakton, ke la Plenuma Komitato de Unesko decidis en novembro 1959, ke D-ro Zamenhof estu deklarita unu el la grandaj personecoj de homaro, kaj asertas, ke "tio estis nur unu ero el la programo vasta kaj varia por la Zamenhofa centjara jubileo, kiu okazis sub la aŭspicio de Internacia Patrona Komitato". Fakte, tiu "ero" tute ne troviĝis en la Programo por la Zamenhof-Jaro, ellaborita de la subskribinto kaj akceptita de la Internacia Organiza Komitato sub la prezidanteco de la tiama prezidanto de UEA Prof. D-ro G. Canuto, sed estis rezulto de alia agado de la subskribinto surbaze de la Rezolucio de 10.12.1954.

Se tiom da eraroj troviĝas en nuraj kelkaj linioj de unu paĝo, oni facile komprenos, ke la tuta "dokumento" de la komenco ĝis la fino estas plena de misprezentitaj faktoj, malĝustajoj, gravaj ellaso, koscijaj prisilentoj kaj rektaj malveroj. Ekzemple, tute ne estas menciitaj la grandaj kampanjoj de UEA okaze de Jaro de Homaj Rajtoj (1968), Jaro de Internacia Kunlaboro (1965), k.a.; nenia mencio pri la publikaĵoj de Unesko kaj UN en Esperanto je la kostoj de tiuj organizaĵoj; la informo pri la Kontraŭrasisma Jardeko estas simpla blufado, ĉar ĝis nun nenio estas farita por realigi tiun okazan planon, kiun iniciatis kaj ellaboris la subskribinto kaj kiun la Komitato de UEA akceptis en 1974. En tiu tuta "dokumento" pri Unesko kaj UEA, la rolo de la persono,

kies agadoj en la nomo de UEA estis ligitaj al Unesko de 1950 ĝis aŭgusto 1974, estas komplete prisilentita. *Fakte, tio ne plu estas nur prisilento, sed konscia falsaĵo.* Eĉ la Bibliografio (p. 9) entenas erarojn kaj falsaĵojn: la verko *Esperanto en Perspektivo* ne estis “*redaktita de Lapenna, Lins kaj Carlevaro*”, sed de mi kiel ĉefredaktoro kaj de Lins kiel redaktoro; tiu verko ne “*enhavas detalan diskuton pri la rilatoj de UEA kaj Unesko*”, sed ĝi entenas absolute ĝustan prezenton de faktoj kaj analizojn de la decidoj de Unesko kaj de tiuj rilatoj en ĉap. 22 kaj en aliaj partoj, verkitaj ne “*anonyme*”, sed konkrete de la subskribinto; same tiel estas ellasita mia nomo kiel aŭtoro de *The International Language and Contribution of the Esperanto Movement to the Aims of Unesco* (RDC 4/1954), kaj forestas mencio, ke ĝi aperis ankaŭ en la franca, hispana kaj Esperanto; nenia informo pri la fakto, ke *Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto)* atingis 16 eldonojn en 13 lingvoj ĝis la fino de 1972 (*EeP*, p. 673); nenia mencio pri aliaj esencaj artikoloj kaj dokumentoj, sed, kompanse, tie troviĝas la verko de Fradier *Oriento kaj Okcidento al Reciproka Kompreno*, eldonita en Esperanto je la kostoj de Unesko en 1962, kiu tute ne apartenas al “*bibliografio*” (la fakto, ke ĝi troviĝas tie montras, ke la kompilinto nek legis ĝin, nek komprenis pri kio temas).

La *kontribuo de UEA al la Monda Paco* estas la titolo de n-ro 2. La aŭtoro estas U. Lins. Temas pri kompilaĵo, bazita parte sur tekstoj en *EeP* verkitaj de U. Lins, pri kiuj li prave konservis siajn aŭtorajn rajtojn kaj tial prave utiligis ilin, kaj grandparte sur ĉapitroj 12.9.1, 12.9.2, 13.2, 13.4, 22.2 k.a. (p-oj 365-368, 385, 388-390, 752-754) k.a., pri kiuj la subskribinto, same prave, rezervis siajn aŭtorajn rajtojn kaj kiujn la kompilinto senpermesite, do malprave, utiligis por sia kompilaĵo. La kompilinto utiligis ankaŭ la ampleksan dokumenton CED/Int./11 de la 8-a de oktobro 1960, sed tute ne menciis ĝin. P-to 3 de la kompilaĵo (Konkludo) estas laŭvorta transskribo de teksto sur p. 12, aldono A/de CED/Int./11, verkita de la subskribinto. Diference de n-ro 1, en tiu ĉi n-ro 2 de la “*nova serio*” forestas gravaj rektaj malĝustaĵoj, sed la kompilinto tamen prisilentis multajn esencajn faktojn lige kun la agadoj de UEA por la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, internacia kompreniĝo kaj humaneca internaciismo en tuta historia epoko, nome ekde la mezo de 1947 ĝis la mezo de 1974. Kelkaj el la grandaj mondiaj kampanjoj sur tiu kampo ja estas supraĵe menciitaj, sed la nomo de la iniciatinto kaj organizinto estas plian fojon ellasita. La aliaj multnombraj agadoj — inkluzive amason da artikoloj kaj prelegoj, reprezentigon en konferencoj, eĉ tutan libron — estas prisilentitaj. Tiuj ellasoj ne povas esti hazardaj, ĉar sur la antaŭa paĝo de la kompilaĵo la roloj de E. Privat kaj H. Hodler en la periodo post la Unua Mondmilito estas prave akcentitaj.

En la Bibliografio ne estas indikitaj la ĉapitroj de *Esperanto en Perspektivo*, sur kiuj baziĝas la kompilaĵo, evidente kun la celo prisilenti plian fojon la nomon de la verkinto. La indiko en la noto, ke la kompilaĵo rilatas al 13.5 de *EeP* (“*UEA Kandidato por la Nobel-Pacpremio*”) estas malĝusta: tiu “*dokumento*” iel rilatas al 13.4 de *EeP*, nome al subĉapitro “*Por Homaj Rajtoj kaj Internacia Kunlaboro*”.

Esperanto tra la Etero de Humphrey Tonkin (n-ro 3 de la “*nova serio*”) baziĝas preskaŭ komplete sur ĉap. 12.3 (“*Radio*”) de *EeP*, verkita de la subskribinto. En la kompilaĵo troviĝas ne nur resumoj el tiu ĉapitro, sed eĉ laŭvortaj transskriboj. Ekzemple, la statistika tabelo sur p. 6 de la “*dokumento*” estas laŭvorta transskribo de la tabelo sur p. 352 de *EeP*, al kiu estas aldonitaj informoj pri la elsendoj en 1974 kaj 1975, ellaboritaj de G. Larglantier, multjara kunlaborinto de CED. Specimene jen alia ekzemplo de transskribado:

I. L. en *EeP*, p. 350

«Ankaŭ Radio Parizo havis ĉiutagajn elsendojn en Esperanto ekde 1948 ĝis aprilo 1950. Kvankam miloj da leteroj el ĉiuj partoj de la mondo, speciale el la landoj de Orienta Eŭropo, evidente montris la grandan interesiĝon por la elsendoj de Radio Parizo en Esperanto, tamen, pro manko de financaj rimedoj kaj verŝajne ankaŭ pro aliaj kaŭzoj, la direkcio ĉesis tiujn ĉiutagajn elsendojn, samtempe kun la ĉesigo de la elsendoj en kelkaj aliaj lingvoj...» ktp.

H. Tonkin en la dok., p. 2-3

«Ĉiutagaj elsendoj en Esperanto estis regula programero de Radio Parizo de 1948 ĝis aprilo 1950. Kvankam miloj da leteroj el ĉiuj partoj de la mondo, precipe el la landoj de orienta Eŭropo, atestis pri la multa intereso, kiun uzantoj de Esperanto montris al tiuj ĉiutagaj elsendoj, oni ĉesis ilin pro financaj, kaj probable aliaj, motivoj, samtempe kiel tiujn en pluraj aliaj lingvoj...» ktp. laŭvorte el *EeP*.

Se oni esceptas la ioman malbonigon de la stilo de la originalo en la versio de H. Tonkin, tiuj du tekstoj estas identaj. Kaj tio tutsimple nomiĝas plagiato. Simile en aliaj partoj de la “*dokumento*”. Estas sufiĉe bedaŭrinde konstati al kia nivelo malfortiĝis iam promesoplenaj intelektuloj.

5.1.3 *Konklude.* — Eĉ se oni malatentas la juran aspekton kaj se oni forgesas la etikan — kaj bedaŭrinde, en la nuna UEA tro multaj malatentas la juran kaj inklinas forgesi, ke sen etika bazo la Esperanto-Movado perdas sian sencon, eĉ la ekzistojon — la «*dokumento*» estas grandega fuŝaĵo. Laŭ sia enhavo ili ne nur ne estas «*suplemento* de tiu grava manlibro» (bone, ke *EeP* de 844 p-oj ne estas nomita «*poŝlibro*»), kiel promise en la antaŭanonco, sed, tute male, deformas kaj falsas multajn faktojn entenatajn en tiu verko. Tiuj partoj de la «*dokumento*», kiuj enhavas ĝustajn informojn,

estas plagiatoj, eĉ laŭvortaj transskriboj, do kontraŭaj al la promesoj en la reklamoj kaj, krome, tute superflujaj, ĉar la koncernaj faktoj estas multe pli komplete prezentitaj kaj analizitaj en la respektivaj ĉapitroj de *EeP*.

Tial la «dokumento» estas forte malaprobindaj. Oni povas nur insiste rekomendi al ĉiuj agantoj en la Esperanto-Movado ne aboni tiujn malfidindajn tekstojn, ankoraŭ malpli utiligadi ilin por informado kaj dokumentado. Seriozaj aktivuloj povas en ĉiu momento facile havigi permeson de la subskribinto por utiligi tiucele la partojn de *EeP*, pri kiuj li respondecas kaj konservas la aŭtorajn rajtojn.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 20.2 de *Esperanto en Perspektivo*.

5.2 Kontraŭstatuta nomigo de ĉefdelegito de UEA en USSR.

La Oficiala Informilo n-ro 497 de la CO de UEA (*Esperanto*, n-ro 4/1976, p. 79) informas, ke s-ro Boris Kolker fariĝis ĉefdelegito de UEA por Soveta Unio. Oni sciiĝas, ke "la nomigo — konforme al art. 15 de la *Generala Regularo de UEA — sekvis post konsultoj/konsultiĝoj/kun la Esperanto-Komisiono en Moskvo kaj kun Soveta Esperantista Junulara Movado (SEJM)*".

Ĉu tiu nomigo estas fakte konforma al la Statuto kaj Generala Regularo?

El art. 21 de la Statuto sekvas, ke ĉefdelegito aŭ peranto reprezentas la Asocion en la koncerna lando. Laŭ art. 23 de la Statuto, la kondiĉoj por la nomigo estas fiksitaj en la Generala Regularo. Art. 14 kaj 15 de tiu Regularo antaŭvidas nur du eblajn situaciojn: (i) en lando, kies asocio aliĝis al UEA, la ĉefdelegito estas nomata de la landa asocio interkonsente kun la ĝenerala sekretario de UEA (art. 14); (ii) en lando, kies landa asocio ne aliĝis al UEA, la direktoro de la CO rajtas nomi ĉefdelegiton aŭ peranton (art. 15). Neniu artikolo antaŭvidas intervenon en kiu ajn formo de organizaĵoj aŭ instancoj ekster UEA. La komuniko de la CO facile kredigas la neinformitan legantaron, ke la "Esperanto-Komisiono en Moskvo" estas ia sendependa Esperanto-instanco ligita iel al UEA. Fakte, temas pri la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, siavice sekcio de Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj, do de partia-ŝtata instanco, troviĝanta sub plena kontrolo de la sovetaj partiaj aŭtoritatoj. Aliflanke, SEJM kiel ia organizita asocio tute ne ekzistas. Eĉ laŭ la Estrara Raporto de UEA por 1974/75, p-oj 20-21, tiu "movado" estas "en stato de organiziĝo" kaj troviĝas "ekster la kadro de TEJO", do ankaŭ de UEA.

Tio signifas, ke la nomigo de la ĉefdelegito de UEA por Soveta Unio okazis ne konforme al art. 15 de la Generala Regularo, sed kontraŭ la regulo de tiu artikolo, kaj kontraŭ la spirito de la Statuto de UEA. En la tuta historio de UEA ĝis Hamburgo (1974) neniam okazis, ke UEA "konsultus" (se entute la vorto "konsultiĝo" ne estas eŭfemismo por ordinara submetiĝo) kian ajn partipolitikan aŭ ŝtatan instancon en kiu ajn lando por nomi sian ĉefdelegiton. Temas pri plia ago, nete kontraŭa al la Statuto, sed tute konforma al la unudirekta politikigo de UEA sub la nuna gvidantaro. Aldone al la plia malobservo de la Statuto, la paŝo estas ankaŭ sencece superflua, "ĉar el *Soveta Unio ne estas eble transpigi kotizojn al UEA*", kiel eksplicite rekonite en la menciita Oficiala Informilo mem.

Tiu ĉi ero kompletigas ĉap. 18.4.2.6 de *EeP* kaj 5.4 de *Hamburgo en Retrospektivo*.

Ivo Lapenna


I N F O R M O

La fakto, ke dum kelkaj monatoj mi devos ekskluzive prizorgi mian profesion laboron pro akumuliĝo de urĝaj taskoj, postulos de mi portempan forreston el mia redaktora posteno de HORIZONTO.

Samtempe mi emfaze deklaras, ke mi restas ligita al la principoj kaj celoj de la Neŭtrala Esperanto-Movado, kaj ke, tuj kiam miaj personaj cirkonstancoj permesos, mi denove aktivos en la defendo de ĝiaj tezoj.

Mi kaptas la okazon por profunde danki la vortojn de solidareco kaj simpatio esprimitajn de multaj legantoj, al kiuj mi sendas plej elkorajn salutojn.

Fernando de Diego



PRI LA LOKO DE LA 3.^o INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO MOVADO

La 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado okazos en unu el la plej ravaj regionoj de Danlando, Norda Selando, pli precize: en Humlebæk, vilaĝo origine fiŝkaptista (do tuj apud la bordo de la markolo inter Danlando kaj Svedio, Sundo) situanta nur 36 km de Kopenhago kaj 8 km de Elsinoro.

La konferencejo estas la altlernejo Krogerup, dane: *Krogerup Højskole*. La centra parto de tiu estas la ĉefdomo de la iama sinjorbieno Krogerup konstruita en 1779. Ĝi estas nun taŭge adaptita por altlernejaj celoj.

La altlernejo ekfunkciis en 1946 kiel kunvena centro por gejunuloj de ĉiaj konceptoj kaj interesigantaj pri la junulara kaj popolkleriga agadoj. Ĝi havas bonegajn kunvenajn salonojn kaj ĉarmajn unu- kaj dultajn ĉambrojn. La Organiza Komitato de la 3-a IK/NEM opinias, ke pli taŭga kunveno por la konferenco ne troveblas en Danlando.

Pri la provizora programo de la konferenco vi povas legi en la 1-a Oficiala Informilo en tiu ĉi numero de *Horizonto*. La konferencaj kotizoj kaj la prezo de loĝado en la altlernejo estas informitaj sur la aldonita *Aliĝilo*, Ekstraajn ekzemplerojn de la aliĝilo vi povas peti per poŝtkarto al

H. V. Rasmussen
Bygtoften 8
DK-2800 Lyngby
Danlando

EL NIAJ AGAD-GRUPOJ

FR Germanujo

En la universitato de Sarlando (Saarbrücken) ĉi-semestre sub gvido de R. Haupenthal denove funkcias du Esperanto-kursoj: unu por komencantoj kaj alia por progresintoj kun duobla celo: studo de la Esperanta vortfarado en ties historia dimensio kaj tradukaj stil-ekzercoj.

En letero de Germana Esperanto-Asocio (GEA) al Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) de Majo 1976 ties estrarano Heinrich Nischwitz sciigas, ke GEA rifuzas havi kontakton kun SEL kaj same rifuzas interŝanĝi informojn. Samtempe li skoldis la Esperanto-Amikojn Mannheim-Ludwigshafen pro ties interkonsento kun SEL (vd. HORIZONTO 3/1976). Jen plia pruvo kiel GEA galopas en dekadencan.

Propono al pluraj germanaj aŭto-firmaoj eldoni prospektojn en Esperanto laŭ la ekzemplo de Fiat alportis negativan rezulton kun unu escepto: la firmao Porsche volas konsideri la aferon se por tio montriĝos bezono. Estus do utile, se multaj esperantistoj petus Esperantan prospekton de Porsche AG, Pf. 400670, D-7000 Stuttgart 1.

La 8a Kultura Semajnfino de SEL okazos de 17-19 Oktobro 1976 en la kastelo "Junkerwald" en Blieskastel-Niederwürzbach. Okazos kursoj por komencantoj kaj progresintoj (gvido: Jean Thierry, Paris) kaj preleg-serio de Hartmut Trunte (Bonn) pri: Enkonduko en la lingvistikon de Esperanto. Petu detalan programon kaj aliĝilon ĉe: SEL, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

R. H.

POST LA INTERKONSENTO INTER UEA KAJ ILEI

PRINCIPA DEKLARO DE LA PREZIDANTO DE ILEI

Per sia decido en la X-a konferenco de ILEI en San Marino (23/29-7-76) la asembleo de ILEI aprobis la interkonsenton pri kunlaboro inter UEA kaj ILEI.

Ĝi ĉefe tekstas, ke ambaŭ organizaĵoj konsentas pri la neceso de kunlaboro inter ili por progresigi Esperanton. Tiucele la du organizaĵoj interkonsilos pri esencaj demandoj koncerne la instruadon de Esperanto; klopodos atingi Interŝtatan Konvencion rilate la instruadon de Esperanto en la lernejoj; interkontaktos rilate agadojn ĉe UNESKO, instigos aranĝi kaj partopreni infankongresetojn.

Plue per komunaj prezentiĝoj dum kongresoj kaj konferencoj ILEI kaj UEA intencas publike informi kaj akcenti aktualajn temojn. (1)

La interkonsento signifas ke ILEI ne estas iaforme laŭstata kunlaboranta fako de UEA. Temas pri interkonsento de du plene sendependaj organizaĵoj.

Post la unikaĵ eventoj de Hamburgo ĉesiĝis la Ero de Ivo Lapenna, impona personeco kies signifo por la evoluo de Esperanto ĉiam restos netuŝebla. «Liaj esceptaj kvalitoj de diplomato, organizanto kaj oratoro altigis UEA ĝis la rango de rekonata internacia organizo» (2). Abrupte ankaŭ finiĝis la tre intimaj rilatoj inter UEA kaj ILEI kies asociiĝo baziĝis sur la integra forto de Lapenna.

Tiu ĉi nuntempa UEA ne plu estas la sama organizaĵo kiel antaŭ Hamburgo. Ĉiu baza kaj esenca ŝanĝiĝo en iu evoluo ŝanĝos ankaŭ la pensmanieron kaj konceptojn.

La grava ŝanĝiĝo de Hamburgo instrue demonstris al mi, ke ILEI nun kaj estontece nepre devas eviti ĉion, kio povus dronigi ĝin en kirlakvo de eventoj, kies ekiron ĝi ne kaŭzis.

La interkonsento kun UEA estas utila sed ne grava. Mi nur tie klopodos pri kunlaboro, kie mi por ILEI kalkulas utilon. Tial mi opinias, ke la interkonsento pri kunlaboro inter UEA kaj ILEI povos esti longe valida ĝis pruviĝos la kontraŭo. Tio validas por ĉiuj similaj interkonsentoj kun aliaj organizaĵoj — kaj jam estas kelkaj.

Do, per la interkonsento mi ne intencas levi la prestiĝon de UEA ankaŭ ne de ILEI. Ni lernis uzi niajn proprajn fortojn! Niaj rilatoj estas nete pragmataj.

Kiam kelkaj sekcioj de ILEI forte maltrankviliĝis, timante, ke la estraro de ILEI entute intencis neglekti la sanktan gralon, ni jam detale estis analizintaj la posthamburgajn eventojn kaj decidis pri novaj vojoj de kunlaboro strikte priatente nian memstarecon kaj suverenecon.

Tute superflue niaj socialismaj sekcioj provis premi nin ĉu ĉantaĝe aŭ ultimate, postulante la senprokrastan revenon al UEA. Ili ne hezitis malhelpi nian vicprezidanton el Hungario viziti niajn estrarkunsidojn aŭ konferencojn kaj eĉ minacis, blokeksiĝi el ILEI.

Nun, post la interkonsento nia vicprezidanto ĉeestis en San Marino.

Kio vere gravos, estas baldaŭaj konkretaj rezultoj inter ILEI kaj UEA. Spekulacioj pri sukcesplena pacigo de iu estas subnivelaj.

La Prezidanto
H. SONNABEND

(1) Prezentiĝo kompreneble ne povas signifi, ke ILEI ĉiam sekvu la ŝpurojn de kongresaj lokoj de UEA. Prefere la du organizaĵoj decidu pri komunaj lokoj, por ne embarasi membrojn, kiuj deziras partopreni en ambaŭ aranĝoj.

(2) D. G. Waringhien.

ALVOKO AL LA AKADEMIO DE ESPERANTO

La 7a Kultura Semajfesto de Sarbandoj
La Esperanta tradukarto far Fernando de Diego (7-9 Majo 1976), aŭskultinte
de Esperanto kaj aparte ties Literaturan Sekcion, ke
mi informu la Esperantan publikon pri la kvalito de la aperantaj tradukoj;
mi liston de tradukoj ĝis nun aperintaj en Esperanto rekomendindaj el
mi; mi plue la unuecigon de la naciaj Esperantaj vortarej rilate ties

POST LA INTERKONSENTO INTER UEA KAJ ILEI

PRINCIPA DEKLARO DE LA PREZIDANTO DE ILEI

Per sia decido en la X-a konferenco de ILEI en San Marino (23/29-7-76) la asembleo de ILEI aprobis la interkonsenton pri kunlaboro inter UEA kaj ILEI.

Ĝi ĉefe tekstas, ke ambaŭ organizaĵoj konsentas pri la neceso de kunlaboro inter ili por progresigi Esperanton. Tiucele la du organizaĵoj interkonsilis pri esencaj demandoj koncerne la instradon de Esperanto en la lernejoj; interkonsilis pri interkonsilion rilate la instradon de Esperanto en la lernejoj; interkonsilis rilate agadojn ĉe UNESKO, instigos aranĝi kaj partopreni infankongresojn.

Plue per komunaj prezentiĝoj dum kongresoj kaj konferencoj ILEI kaj UEA intencas publike informi kaj akcenti aktualajn temojn. (1)

La interkonsento signifas ke ILEI ne estas ĉifortime laŭstata kunlaboranta fakodepartemento de UEA. Temas pri interkonsento de du plene sendependaj organizaĵoj.

Post la unika evento de Hamburgo ĉesigis la Ero de Ivo Lapenna, impona personeco kies signifo por la evoluo de Esperanto ĉiam restos netuŝebla. «Laj esceptaj kvalitoj de diplomato, organizanto kaj oratoro altigis UEA ĝis la rango de rekonata internacia organizaĵo» (2). Ābrupte ankau ĉmigiis la tre intimaj rilatoj inter UEA kaj ILEI kies asociiĝo bazigis sur la integra forto de Lapenna.

Tiu ĉi nuntempa UEA ne plu estas la sama organizaĵo kiel antaŭ Hamburgo. Ĉiu baza kaj esenca ŝanĝo en ĝi evoluu ŝanĝos ankau la pensmanieron kaj konceptojn.

La grava ŝanĝo de Hamburgo instrue demonstris al mi, ke ILEI nun kaj estontece nepre devas eviti ĉion, kio povus dronigi ĝin en kirilakvo de eventoj, kies ekiron ĝi ne kaŭzis.

La interkonsento kun UEA estas utila sed ne grava. Mi nur tie klopodos pri kunlaboro, kie mi por ILEI kalkulas utilon. Tial mi opinias, ke la interkonsento pri kunlaboro inter UEA kaj ILEI povos esti longe valida ĝis pruvigos la kontraron. Tio validas por ĉiuj similaj interkonsentoj kun aliaj organizaĵoj — kaj jam estas kelkaj.

Do, per la interkonsento mi ne intencas levi la prestiĝon de UEA ankau ne de ILEI. Ni lernis uzi niajn proprajn fortojn! Niaj rilatoj estas nete pragmataj.

Kiam kelkaj sekcioj de ILEI forte maltrankviligis, timante, ke la estraro de ILEI entute intencis neglekti la sanktan grajon, ni jam detale estis analizinta la posthamburgojn eventojn kaj decidis pri novaj vojoj de kunlaboro strikte priatente nian memstarecon kaj suverenecon.

Tute superflue niaj socialismaj sekcioj provis premi nin ĉu ĉantaĝe au ultimante, postlante la sempokrastian revenon al UEA. Ili ne hezitis malhelpi nian vicprezidanton el Hungario viziti niajn estrarkunsidejojn au konferencojn kaj eĉ minacis, bloke ekzigi el ILEI.

Nun, post la interkonsento nia vicprezidanto ĉeestis en San Marino.

Kio vere gravos, estas baldataj konkretaj rezultoj inter ILEI kaj UEA. Spekuliĝoj pri sukcesplena pacigo de ĝi estas subniveleaj.

La Prezidanto
H. SONNABEND

- (1) Prezentiĝo kompreneble ne povas signifi, ke ILEI ĉiam sekvu la ŝpurojn de kongresaj lokoj de UEA en ambaŭ aranĝoj.
- (2) D. G. Warinĝhen.

ALVOKO AL LA AKADEMIO DE ESPERANTO

La 7a Kultura Semajnfino de Sariaanda Esperanto-Ligo (7-9 Majo 1976), aŭskultinte

serion de prelegoj pri la Esperanta tradukarto far Fernando de Diego alvokas la Akademon de Esperanto kaj aparte ties Literaturan Sekcion, ke

a) ĝi regule informu la Esperantan publikon pri la kvalito de la aperantaj tradukoj;

b) ĝi kompilu liston de tradukoj ĝis nun aperinta en Esperanto rekomendinda el ĝinga vidpunkto;

c) ĝi instigu kaj kontrolu la unuecigon de la naciaj Esperantaj vortaroj rilate ties rolon kiel tradukaj helpiloj.

Blieskastel-Niederwurzbach
9-05-1976

POST LA INTERKONSENTO INTER UEA KAJ ILEI

PRINCIPA DEKLARO DE LA PREZIDANTO DE ILEI

Per sia decido en la X-a konferenco de ILEI en San Marino (23/29-7-76) la asembleo de ILEI aprobis la interkonsenton pri kunlaboro inter UEA kaj ILEI.

Ĝi ĉefe tekstas, ke ambaŭ organizaĵoj konsentas pri la neceso de kunlaboro inter ili por progresigi Esperanton. Tiucele la du organizaĵoj interkonsilos pri esencaj demandoj koncerne la instruadon de Esperanto; klopodos atingi Interŝtatan Konvencion rilate la instruadon de Esperanto en la lernejoj; interkontaktos rilate agadojn ĉe UNESKO, instigos aranĝi kaj partopreni infankongresetojn.

Plue per komunaj prezentiĝoj dum kongresoj kaj konferencoj ILEI kaj UEA intencas publike informi kaj akcenti aktualajn temojn. (1)

La interkonsento signifas ke ILEI ne estas iaforme laŭstatuta kunlaboranta fako de UEA. Temas pri interkonsento de du plene sendependaj organizaĵoj.

Post la unikaj eventoj de Hamburgo ĉesigis la Ero de Ivo Lapenna, impona personeco kies signifo por la evoluo de Esperanto ĉiam restos netuŝebla. «Liaj esceptaj kvalitoj de diplomato, organizanto kaj oratoro altigis UEA ĝis la rango de rekonata internacia organizo» (2). Abrupte ankaŭ finiĝis la tre intimaj rilatoj inter UEA kaj ILEI kies asociiĝo baziĝis sur la integra forto de Lapenna.

Tiu ĉi nuntempa UEA ne plu estas la sama organizaĵo kiel antaŭ Hamburgo. Ĉiu baza kaj esenca ŝanĝiĝo en iu evoluo ŝanĝos ankaŭ la pensmanieron kaj konceptojn.

La grava ŝanĝiĝo de Hamburgo instrue demonstris al mi, ke ILEI nun kaj estontece nepre devas eviti ĉion, kio povus dronigi ĝin en kirlakvo de eventoj, kies ekiron ĝi ne kaŭzis.

La interkonsento kun UEA estas utila sed ne grava. Mi nur tie klopodos pri kunlaboro, kie mi por ILEI kalkulas utilon. Tial mi opinias, ke la interkonsento pri kunlaboro inter UEA kaj ILEI povos esti longe valida ĝis pruviĝos la kontraŭo. Tio validas por ĉiuj similaj interkonsentoj kun aliaj organizaĵoj — kaj jam estas kelkaj.

Do, per la interkonsento mi ne intencas levi la prestiĝon de UEA ankaŭ ne de ILEI. Ni lernis uzi niajn proprajn fortojn! Niaj rilatoj estas nete pragmataj.

Kiam kelkaj sekcioj de ILEI forte maltrankviliĝis, timante, ke la estraro de ILEI entute intencis neglekti la sanktan gralon, ni jam detale estis analizintaj la posthamburgajn eventojn kaj decidis pri novaj vojoj de kunlaboro strikte priatente nian memstarecon kaj suverenecon.

Tute superflue niaj socialismaj sekcioj provis premi nin ĉu ĉantaĝe aŭ ultimate, postulante la senprokrastan revenon al UEA. Ili ne hezitis malhelpi nian vicprezidanton el Hungario viziti niajn estrarkunsidojn aŭ konferencojn kaj eĉ minacis, bloke ekŝiĝi el ILEI.

Nun, post la interkonsento nia vicprezidanto ĉeestis en San Marino.

Kio vere gravos, estas baldaŭaj konkretaj rezultoj inter ILEI kaj UEA. Spekulacioj pri sukcesplena pacigo de iu estas subnivelaĵ.

La Prezidanto
H. SONNABEND

(1) Prezentiĝo kompreneble ne povas signifi, ke ILEI ĉiam sekvu la ŝpurojn de kongresaj lokoj de UEA. Prefere la du organizaĵoj decidu pri komunaj lokoj, por ne embarasi membrojn, kiuj deziras partopreni en ambaŭ aranĝoj.

(2) D. G. Waringhien.

ALVOKO AL LA AKADEMIO DE ESPERANTO

La 7a Kultura Semajnfino de Sarlanda Esperanto-Ligo (7-9 Majo 1976), aŭskultinte serion de prelegoj pri la Esperanta tradukarto far Fernando de Diego alvokas la Akademion de Esperanto kaj aparte ties Literaturan Sekcion, ke

- ĝi regule informu la Esperantan publikon pri la kvalito de la aperantaj tradukoj;
- ĝi kompilu liston de tradukoj ĝis nun aperintaj en Esperanto rekomendindaj el lingva vidpunkto;
- ĝi instigu kaj kontrolu la unuecigon de la naciaj Esperantaj vortaroj rilate ties rolon kiel tradukaj helpiloj.

Blieskastel-Niederwürrzbach
9-05-1976

NEFERMITA LETERO

AL S-RO GUSTAV KÜHLMANN

En HORIZONTO, n-ro 4, p-oj 94-95, estis publikigitaj mia *Nefermita Letero al la Danaj Komitatanoj de UEA*, kiun EHO rifuzis represi, kaj nova *Nefermita Letero al S-ro Ib Schleicher* okaze de ties "respondo" al la unua letero.

Ankaŭ via "respondo", kiu same kiel tiu de *Ib Schleicher* neniel tuŝas la demandojn prezentitajn de mi, instigas min denove turni min al vi esperante povi per tio igi vin suplementi al tio, kion vi jam malkaŝis pri via sinteno al certaj demandoj, kiujn mi kaj aliaj danaj kaj alilandaj esperantistoj opinias gravegaj por la estonteco de la neŭtrala Esperanto-movado.

Enkonduke via letero de la 24-a de marto 1976 enhavas jenajn liniojn:

"Mi fakte kredis vin sincera kaj progresema esperantisto, kiu vidas antaŭ vi la finan celon de tiu nobla afero "Esperanto — la dua lingvo por ĉiu". Sed nun mi vidas, ke vi ankoraŭ troviĝas en la jaro 1974 malgraŭ tio, ke ni skribas 1976."

Do vi ne plu opinias min sincera, kaj tion vi deklaris en letero destinita por publikigo en EHO! Tial mi devas demandi vin:

Kio en mia letero pravigas vian opinion, ke mi ne estas sincera?

La signifo de la vorto *progresema* dependas de la signifo de *progreso*, kaj pri tio lige al la Esperanto-movado ni evidente havas kontraŭajn opiniojn. Tamen mi asertas, ke mi emas progresi en mia scio pri tio, kio en la nunaj jaroj okazas en la Esperanto-movado. Guste tial mi skribis la unuan nefermitan leteron al tiuj du danoj, kiuj apartenas al la interna decidopova rondo de UEA, celante ricevi informojn pri aferoj, kiujn mi eble ne sufiĉe bone komprenas.

Via ner respondo al la *Publikaj Demandoj al la Nuna Gvidantaro de UEA* (HORIZONTO, n-ro 1, p. 18) estas, kiel mi skribis en miaj komentoj al la supre menciitaj nefermitaj leteroj, en si mem elokventa. Mi devas laŭ tio konkludi, ke tiuj publikaj demandoj estas al vi tiel embarasaj, ke vi konscias pri la neebleco doni kontentigajn respondojn — alivorte, ke vi tiel pravigas la asertojn de prof. *Ivo Lapenna*.

Nu, kompreneble, la ner respondo kvankam elokventa ne estas preciza respondo, kaj mia konkludo eble bezonas modifon.

Tial, por povi konkludi laŭ plenaj informoj, mi denove petas vin publikigi — en HORIZONTO — vian klarajn respondojn al la Publikaj Demandoj.

Mi atentigas, ke — se fakte vi opinias, ke "bedaŭrinde kelkaj personoj ankoraŭ portas okulŝirmilojn kaj ne volas vidi la realon" (pri kio mi efektive konsentas, sed ja en alia senco ol via) — estas en via propra intereso kaj tiu de la tuta gvidantaro de UEA prezenti tiajn klarajn respondojn kaj, se eble, refuti la argumentojn de prof. *Lapenna*.

Vi referencas al artikolo en LA ESPERO de ĝia redaktoro, *Ake Blomberg*, pri kies vidpunktoj vi konsentas. Vi do konsentas ankaŭ kun la prezidanto de UEA, d-ro *H. Tonkin*, kiu en la dana gazeto POLITIKEN (10/7 1976) skribis pri UEA (mia traduko):

"Konsciante pri tio, ke la plimulto de la Estraro (6 el 8) loĝas en Okcidenta Eŭropo kaj Usono, kaj ke la plimulto de la reprezentantaro [Komitato] de la Asocio loĝas en ne-komunistaj landoj, estas duoble sensenca la aserto [de prof. *Lapenna*] pri komunista gvidado."

Cu fakte vi kiel la UEA-prezidanto opinias, ke la adreso de persono pruvas ion pri liaj politikaj vidpunktoj, agoj kaj intencoj aŭ pri lia preteco — konscia aŭ pro naiveco — lasi sin ekspluati por politikaj celoj?

*Cu ankaŭ vi ne povas trovi aliajn, pli konvinkajn argumentojn, kapablajn refuti la asertojn de prof. *Lapenna*?*

En via letero vi kaptis la okazon por kritiki certajn personojn kun aŭ sen mencio de la nomoj. Pro tio mi — kvankam per mia letero mi intencis iniciati diskuton nur pri aferoj, ne pri personoj — aldonas, ke verŝajne en ĉiuj movadoj ekzistas homoj, pri kiuj la gvidantoj devas diri kun la antikva reĝo: "Dio protektu min kontraŭ miaj amikoj. La malamikojn mi mem venkos". Oni devas bedaŭri, ke tiuj homoj en sia fervoro, oferante sian tempon, laboron kaj monon por afero meritanta ilian sindediĉon, kelkfoje survoje al la nobla fina celo laŭ la tien kondukanta magistralo erariras en sakostraton.

Kaj, ĉu eble ankaŭ vi estas tia homo?

Kiel mi referis en HORIZONTO, n-ro 3, p. 67, vi en la ĝeneralkunveno de DEA klarigis, ke senkonsidere al paragrafoj 4 kaj 13 de la Statuto de UEA oni devas — por esti plene neŭtrala — akcepti ĉiujn landajn asociojn, kiuj deziras aliĝi al UEA.

Tiu via deklaro ja malharmonias al la *Rezolucio pri Neŭtraleco* de la Komitato de UEA, laŭ kiu "... la politika neŭtraleco de UEA, kiel ĝi estas priskribita en la artikoloj 4 kaj 13 de ĝia statuto, ĉiam estis, kaj ĉiam restos la fundamenta gvidprincipo de ĝia tutmonda agado ...".

Pledante en la ĝeneralkunveno de DEA por akcepto en UEA de asocioj neneŭtralaj laŭ la senco de ties Statuto, vi agis kontraŭ tiu rezolucio, por kiu vi eble mem voĉdonis en la komitata kunveno en Kopenhago.

Mi ne kontestas, ke vi kiel Komitatano havas la rajton proponi ŝanĝojn de la statutaj reguloj, se tiajn vi trovas necesaj aŭ dezirindaj.

Sed, ĉu vi — ankoraŭfoje pripensinte la aferon — ne povas konsenti pri tio, ke vi kiel Komitatano havas la devon respekti kaj respektigi la statutajn regulojn, dum ili validas

Estas atentinde, ke vi ne estas "ordinara" Komitatano A aŭ B, sed Komitatano C alektita "el inter la elstaraj membroj de la Asocio, kiuj pro siaj scioj, spertoj kaj laboro povas efektive kaj aktive helpi al la agado de la Asocio" (Generala Regularo de UEA, par. 29), kaj ke vi estas Honora Membro de DEA.

Lyngby, la 23-an de julio 1976.

H. V. Rasmussen

M A L L O N G E

Denove mi dankas al la Esperanto-Redakcioj de Radio-Vieno kaj Radio-Zagreb pro ilia daŭra atento kun mencio kaj komento de la ĉefaj artikoloj, kaj pro ilia afabla diskonigo de nia periodaĵo.

Aŭstrio

La Welsaj kulturtagoj. — De la 24-a ĝis la 27-a de junio 1976 okazis en la supra-aŭstria urbo Wels Esperanto-kulturtagoj.

Laŭ la raporto de Emil Vokal disaŭdiĝita de Radio-Vieno, la aranĝo atingis rimarkindan sukceson, kio ne miras nin pro la intereso de la programo, la bone organizita propagando kaj la entuziasmo

kaj kapablo de la organizintoj.

44^a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. — De la 24-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto okazis en Stubenberg — Graz la ĉijara Internacia Kongreso de Blindaj esperantistoj sub la lerta gvidado de la prezidanto Harald Rader.

Krom la kutima labor-programo, oficialaj aranĝoj kaj prelegoj, dum la Kongreso okazis vizito al la Blindulinstituto en Graz kaj Kultura Posttagmezo.

Partoprenis la Kongreson 104 personoj el 16 landoj.

Informo el raporteto de Josef Eder.

NEKROLOGO

En Burgneusstadt (RF Germanujo) forpasis Hermann Hausmann, fervora esperantisto fidela al la Zamenhofa idealo.

2.^a INTERNACIA ESPERANTO-SEMINARIO DE SEL en Neustadt/Weinstr. de 26-12-1976 ĝis 2-1-1977

Sarlanda Esperanto-Ligo invitas al sia 2.^a Internacia Esperanto-Seminario. Jen la detaloj:

Temo: Enkonduko en la esperantologion.

Programo: Okazos prelegoj kaj grupa laboro sub gvido de:

- Eddy Borsboom, Utrecht (aspekto socia-historia)
- Reinhard Hauptenthal, Saarbrücken (aspekto lingvistika)
- Giorgio Silber, Kuopio (aspekto literatura)
- Tazio Carlevalo, Neuchâtel (aspekto psikolingvistika)

Krome okazos lingvo-kursoj por komencantoj kaj progresintoj, diskutadoj, ekskursoj, arbaraj migradoj kaj silvestra festo.

Informas: Sarlanda Esperanto-Ligo, Franz-Schubert-Str. 26, D-6602 Dudweiler.

SONĜO

«En sonĝo principon mi vidis.» Ne, ne! Mi ne vidis ŝin, nek iun de la reganta familio. Mi vidis ion pli teruran, mi spertis, ke la kara Esperanto jam estas preskaŭ venkanta, ke la lingvo internacia estas vastege uzata. Ĝi estas ĉie. Kaj mi vidis per miaj spiritalaj okuloj kiel sur ŝtataj konstruaĵoj de ĉiuj landoj oni hisis naciajn kaj verdajn esperantajn flagojn. Homoj, pro la reganta en la mondo daŭra ekonomia regreso torento fluis al esperantaj societoj, kie oni ricevis la plej bone pagatajn oficojn kaj postenojn. Esperantaj verkistoj ne plu devis serĉi eldonejojn por siaj gravaj, elstaraj verkoj kaj ricevi kelkajn aŭtorajn ekzemplerojn kiel pagon, se bonŝance la verko aperis. Esperantaj ĵurnalistoj jam ricevis altajn honorariojn por siaj plej aĉaj artikoloj, ĉar la esperanta gazetaro superis nacilingvajn ĵurnalojn kun eldonnombro de milionoj da ekzempleroj. Ĉie estis, ĉion estris la profesiaj esperantistoj.

Subite aŭdiĝis tondra voĉo de la Prezidanto: «Volontuloj, venu!» Kaj ĉie en la vasta Esperantujo apenaŭ malfermiĝis la enirpordoj tra kiuj honteme komencis elŝovi sin unuopaj volontuloj, kiuj pro iuj kaŭzoj ne povis fariĝi pagataj, bone salajrataj profesiaj esperantistoj...

Kaj tiam kovrita per malvarma ŝvito mi vekigis.

Tamen unu vorto «volontuloj» maltrankviligis min. Ĝi rampis sur mia kapo, engravuriĝis en mia memoro. Volontuloj! Kaj subite mi ekkonsciis kaj komprenis: Jes, ja volontuloj estis kaj estas mi, vi, ni, ili, miloj kaj miloj da fervoraj esperantistoj, kiuj dum jaroj, jardekoj ofereme, diversflanke pene agadis kaj agadas por Esperanto, volonte plenumante ĉian laboron, helpontan al la movado, ne postulante ian ajn rekompencon.

Ĉu krom la pagataj laborantoj, cetere ankaŭ bezonataj, oni ree vokas volontulojn?!

La saĝulo Rabi Akiba prave diris: «Nenio nova sub la suno»!...

Mag. Isaj Dratwer
Israelo

BONA HUMORO kun kaj pri FAMAJ HOMOJ

Nancy Astor — la unua virino elektita membro de la brita Parlamento — sin turnis unu fojon furioza al Winston Churchill:

— *Se mi estus via edzino, mi metus venenon en vian kafon!*

Ekridante, kun ironio Churchill respondis:

— *Mi, se mi estus via edzo, mi trinkus ĝin!*

—oOOo—

En iu amuzvespero Mark Twain sin turnis kun afableco al sinjorino en sia proksimeco:

— *Kiel bela estas vi...!*

Siavice la sinjorino ankaŭ afable replikis:

— *Bedaŭrinde mi ne povas respondi per sama komplimento.*

— *Ne gravas, sinjorino: estas simple, procedu kiel mi: mensogu!*

—oOOo—

Ernest Hemingway estis invitita de usona revuo skribi kelkajn kulinariajn receptojn. Ni redonas tiun pri la maniero kiel prepari rostaĵon el leona viando:

“La leono devas esti kaptita... Poste senhaŭtigita... La resto, memkompreneble, estas pli simpla...”

—oOOo—

Oni rakontas, ke en iu tago atenano demandis la filozofon Sokrato-n, ĉu estas bone aŭ ne, ke li edziĝu. La muljana pensisto respondis:

— *Kara amiko. Same estas. Ĉu vi edziĝas, ĉu vi restas fraŭlo, post dek jaroj vi bedaŭros.*

—oOOo—

La romano “*Sur la flugiloj de la vento*” alportas al la aŭtorino, Margaret Mitchell, la konfirmadon en la verkista mondo. En iu tago amikino sin turnas al ŝi:

— *Via libro estas grandega, sed mi petas, diru al mi... Ĉi tio restos inter ni! Kiu skribis ĝin por vi?*

— *Mi estas feliĉa, ke ĝi plaĉis al vi, respondis la romanistino, sed kion mi ne komprenas, tio estas: kiu legis ĝin por vi?*

El la rumana M. P. Dungeanu



VIII FRANCA HISPANA ESPERANTISTA RENKONTIĜO

S-ro Decobert dankas al la Direktoro de la Foiro lian afablan akcepton.

La ĉijara Franca-Hispana Esperantista Renkontiĝo, bonege organizita de nia franca samideano S-ro Decobert, estis ja sukcesa laŭ entuziasmo kaj efiko. Krom la francaj esperantistoj, partoprenis ĝin du portugalaj samideanoj kaj sesdeko da hispanoj.

La tre alloga programo disvolviĝis laŭ horloĝa precizeco. Dum la vizito al la tre interesa Specimen-foiro, la esperantistoj estis oficiale akceptitaj de la Direktoro, S-ro Boneu kaj la Vicurbestro de Tarbes, S-ro Rouzil, kiuj tre afable bonvenigis nin. Invitante la ĉeestantojn trinki, ili mem trinkis kaj tostis kun ni por la sukceso de Esperanto kaj nia kreskanta amikeco.

DONACOJ POR «HORIZONTO»

Edwin Dean, Londono	555 ptoj.	Diana Gastón, Zaragoza, Hispanujo	250 ptoj.
Sjaan Barendregt, Amersfoort, Nederlando	247 »	C. Beckford, Cape Town, Sud-Afriko	60 »
J. M. U., Cádiz, Hispanujo	500 »		
Salvador Oliván, Vigo, Hispanujo	600 »		
Elena Gastón, Zaragoza, Hispanujo	250 »		2.462 »

KRUCVORTENIGMO APERINTA EN "HORIZONTO" N.º 3

Solvo

HORIZONTALE — 1 - Lacedemon — 2 - Inokulade — 3 - Balario — 4 - El - Trot — 5 - Rigid — 6 - Ita - Em - Da — 7 - Gip - Labil — 8 - Akolitare — 9 - Diskretec.

VERTIKALE — 1 - Liberigad — 2 - Analitiki — 3 - Col - Gapos — 4 - Ekami - Lk — 5 - Dur - Delir — 6 - Elit - Mate — 7 - Maori - Bat — 8 - Od - Dive — 9 - Neŭtralec.

3-A INTERNACIA KONFERENCO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO

Humblebæk, Danlando, 23-30 julio 1977

Korespondadreso: cand. oecon. H. V. Rasmussen, Bygtoften 8, DK-2800 Lyngy, Danlando

Oficiala Informilo, n.º 1

Konforme al la decidoj de la Dua Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado la Dana Agadgrupo tuj eklaboris kaj sube informas pri la unuaj rezultoj.

1. *Organiza Komitato.* Formiĝis organiza komitato konsistanta el *H. V. Rasmussen*, prezidanto (kaj kasaferoj), *Rie Krainer*, sekretariino, *Lis Thune* (ekskursoj kaj libro-servo), *Christian Lauridsen* (junularo) kaj *Peter Zacho* (teknikaj aferoj).

2. *Konferencejo.* La konferenco okazos en la *Altlernejo Krogerup* (dane: Krogerup Højskole), kiu situas meze de granda naturparko en belega regiono proksime al la mar-kola bordo inter Kopenhago kaj Elsinoro.

3. *Provizora programo.* La ĉeftemo de la konferenco estos *La lingva problemo en la nuntempo kun aparta konsidero al la bezonoj en Eŭropo*. Kompetentaj specialistoj pritraktos ĝin el diversaj vidpunktoj, kaj poste formiĝos laborgrupoj por pridiskuti la prelegojn kaj fari proponojn al la Pleno pri estonta agado en Eŭropo. Du ĝeneralaj kunvenoj pritraktos la rolon de *Horizonto*, la principaron de publikaj rilatoj kaj aliajn demandojn de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Estas antaŭviditaj kunveno de *Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj*, kunveno de membroj de la *Akademio*, junulara kunveno kaj eventuale aliaj kunvenoj. Okazos distra vespero kun balo kaj gvidataj vizitoj al la mondfama artgalerio *Louisiana* en Humlebæk kaj al la kastelo *Kronborg* en Elsinoro.

4. *Kotizoj.* La konferencaj kotizoj estas fiksitaj jene:

	Gis	Gis	Post
	31/12 1976	31/3 1977	31/3 1977
Konferencan(in)o	100 dkr.	130 dkr.	150 dkr.
Geedza paro	160 dkr.	180 dkr.	200 dkr.
Junul(in)o 15-25-jara	60 dkr.	80 dkr.	100 dkr.
Junul(in)o malpli ol 15-jara	senpage	senpage	senpage

5. *Loĝigo.* La altlernejo havas 30 unulitajn kaj 30 dultajn ĉambrojn kaj tiel povas normale gastigi 90 personojn, sed se necese oni povos meti ekstran liton en ĉiun unulitan ĉambron, kaj cetere ekzistas ebleco disponigi ankoraŭ 10 litojn. Do maksimume 130 konferencanoj povos loĝi en la altlernejo. La prezo por lito kaj plena pensio estas modera kompare kun prezoj de hoteloj. Pri la prezoj kaj pagokondiĉoj por restado en kaj ekster la altlernejo vidu la aliĝilon enmetitan en tiun ĉi numeron de *Horizonto*.

6. *Aliĝo.* Instrukcioj pri aliĝo al la konferenco troviĝas en la menciita aliĝilo. Frua aliĝo certigos loĝadon en la altlernejo, kaj ĝi estas precipe rekomendinda al tiuj, kiuj preferas unulitan ĉambron, ĉar tiaj ekzistas, kiel supre informite, nur en limigita nombro. — Sian partoprenon en la konferenco anoncis jam 24 personoj.

Bonvenon al la 3-a Internacia Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Movado daŭriganta la tradiciojn de la zamenhofs esperantismo — humaneca internaciismo!